



ESPERANTO

NOVEMBRO 1963

56 a Jaro - N-ro 696 (11)

esperanto

REVUO INTERNACIA

NOVEMBRO 1963

5 6 a J A R O

N-RO 696 (11)

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion por redakto oni sendu al la Centra Oficejo.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu du da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., Vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, Kystvej 10, 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

FRONTPAĜA BILDO:

"Ĉiu havas rajton je edukiĝo" (vidu p. 186-9). La sceno estas el Saravaka lernejo. (Foto UNATIONS).

Enhavo

La problemo de sciencaj kaj teknikaj revuoj (Aisberg)	181
Aplikado de Esperanto por sciencaj celoj	181
La lingva problemo en industrio (Cook)	182
Kemiisto frontas al Babelo (Trimble) .	184
Celebrado de la 15-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (I.L.)	186
Pri la Universala Deklaracio (Prof. Lapenna)	186
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (teksto)	188
Premio Comella-Bassols	193

Rubrikoj

CED	190
Novaj libroj	192
Ricevitaj eldonaĵoj	193
Tra la mondo	194
Laŭfake	194
49-a U.K., Hago, 1964	195
La juna vivo	196
Radio	197
Oficiala informilo	197
Internaciaj konkursoj	198

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

La Problemo de Sciencaj kaj Teknikaj Revuoj

Oni eble tion eĉ ne rimarkis: tamen, depost kelka tempo, aperis nova scienco. Kion ĝi studas? Tute simple, ĉiujn sciencojn. Oni povas do ĝin nomi "Sciencologio". Sciencologiistoj analizas la ĝeneralajn leĝojn, laŭ kiuj disvolviĝas diversaj sciencoj, laŭ kiuj ili interagadas kaj laŭ kiuj naskiĝas ĝiaj novaj branĉoj. Tiamaniere ili konstatas ke, en ĉiuj fakoj, la progreso sekvas *eksponentan kurbon*, alivorte ĝi estas pli kaj pli rapida.

Komisiita de UNESKO studi la vojojn, laŭ kiuj evoluas la nuntempa scienco, la fama franca profesoro Pierre Auger konkludas, ke *ĉiujardeke* duobligas la kvanto de novakiritaj konoj, same kiel la nombro de scienculoj, de sciencaj kaj teknikaj revuoj kaj de monsumoj elspezitaj por sciencaj serĉadoj (1). La unua scienca revuo naskiĝis antaŭ preskaŭ 300 jaroj; precize, en 1665. Jam 10 revuoj aperadis en 1750. En 1800, ilia nombro atingis 100. Ili estis 1000 en 1850. Kaj en 1900 estis publikigataj 10.000 sciencaj kaj teknikaj revuoj. Nun, en la mondo, ilia nombro estas *almenaŭ 100.000* (2).

Tiuj revuoj, kiuj estas fundamenta ilo de reciproka interŝanĝo de sperto kaj de ideoj, ilo absolute necesa al plua progreso de sciencoj kaj teknikoj, aperas en ĉiuj lingvoj. Tio signifas terure malracian kaj malŝparan elspezon de fortoj, de tempo kaj de mono. Por ke grava malkovro aŭ invento iĝu konata en ĉiuj landoj, necesas ke informo pri ĝi estu tradukita kaj presita en plej diversaj lingvoj. Sciencistoj dezirantaj esti rapide informitaj devas lerni plurajn lingvojn: anglan, francan, rusan, kaj nun eble ankaŭ ĉinan kaj japanan! Kiel trovi tempon por ne nur akiri necesajn konojn en la elektita specialaĵo kaj ĝeneralan kulturon, sen kiu neniue kreado estas ebla, sed ankoraŭ ellerni ĉiujn ĉi lingvojn? ! De tago al tago, kun la konstanta kresko kaj komplikiĝo de sciencaj konoj, la problemo iĝas pli kaj pli malfacile solvebla.

Solan racian solvon prezentas Esperanto. Ĝia adopto por sciencaj kaj teknikaj revuoj ne nur ebligus al scienculoj dediĉi pli da tempo al studado de siaj specialaĵoj, sed permesus *dekoble malpliigi la nombron de revuoj*, publikigi pli rapide ĉiujn informojn, ilin igi pli precizaj kaj klaraj por ĉiuj legantoj. Kaj samtempe en la ĉiam pli kaj pli multenombraj internaciaj *sciencaj kongresoj* malaperus la ridinda diverseco de lingvoj kaŭzanta tempoperdojn kaj danĝerajn miskomprenojn. Ĉu tiuj, kiuj kreas progreson, montriĝos sufiĉe malprogresemaĵoj por rifuzi la *solan* eblan solvon de la malbenita lingva problemo?

E. Aisberg

Prezidanto de l'UIPRE
(Union Internationale de la Presse
Radiotechnique et Electronique)

(1) Pierre Auger "Tendances actuelles de la recherche scientifique", Parizo, 1961, paĝo 15.

(2) D. Price "Science since Babylon", New Haven, 1961, paĝoj 95—97.


Aplikado de Esperanto

por Sciencaj Celoj

Se la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazonta en Parizo en oktobro 1964-a, aprobos la proponon de sia estraro, la scienca buĝeto de tiu organizaĵo por la jardo 1965-6 preskaŭ duobligos kompare kun la nuna buĝeto. Tio estas nur unu ekzemplo de la raketa progreso de la scienca revolucio: aliajn la leganto trovos en la apuda artikolo de S-ro Aisberg. Konstante kreskas la graveco de scienco en ĉiu flanko de la ĉiutaga laboro, kaj konsekvence la lernejoj ne povas krom dediĉi ĉiam pli grandan atenton al scienca edukado. Kiel konstatas S-ro Cook sur p. 183, la instruado de lingvoj en niaj lernejoj ne ĉiam sekvas la efektivajn bezonojn de la hodiaŭa vivo, sed verŝajne ni povas atendi, ke sub premo de praktikaj postuloj restos instruataj unuavice tiuj lingvoj, kiuj permesas aliron al gravaj fontoj de sciencaj kaj teknikaj faktoj.

Kompreneble ni povas montri al la gravaj avantaĝoj de la Internacia Lingvo por kulturaj kaj ordinare interhomaj rilatoj. Tamen pli vasta aplikado de Esperanto por sciencaj celoj sen ia ajn dubo signifus grandan akcelon de ĝia enkonduko en la lernejojn. Kvankam aperas jam pli da sciencaj lernolibroj en Esperanto, ol antaŭ kelkaj jaroj, kvankam daŭre aperas en diversaj sciencaj kaj teknikaj revuoj resumo kaj artikoloj en Esperanto, kaj kvankam la nombro de la fakaj terminaroj eldonitaj altiĝis ĝis almenaŭ 130, tamen gravaj ambicioj restas ankoraŭ neplenumitaj, i.a. la fortikigo de niaj originalaj sciencaj kaj teknikaj periodaĵoj, la funkciigo de efika traduka servo por scienco kaj industrio, la stabiligo de niaj fakaj organizaĵoj, ktp.

Konsciante ĉion ĉi, ni dediĉas plurnajn paĝojn de la nuna eldono de "Esperanto" al konsidero pri la problemoj, kiujn ni frontas. Por universitataj studoj kaj por rapida diskonigo de novaj eltrovoj, la scienca gazetaro estas rimedo kvankam malmulte kontentiga tamen nepre necesa. Malmultaj ĝin konas pli intime ol S-ro E. Aisberg. Por industrio, aliflanke, pli gravaj estas laŭbezone faritaj studoj kaj raportoj nepublikaj, ol la publikigitaj artikoloj aperantaj en revuoj. Tiun problemon priskribas S-ro A. Cook, kiu parenteze klarigas, ke la centra intereso de la hodiaŭa industrio estas la kemio: ĝuste la temo, pri kiu verkis profesoro Trimble.



Pri la lingva problemo en industrio ĉiuj scias, ke ĝi ekzistas, sed preskaŭ neniu povas doni precizigojn. Escepto estas Arthur Cook, verkinto de ĉi tiu artikolo. Li estas anglo, diplomito de la Londona Universitato, sed laboras en Nederlando kiel direktoro de la traduka fako ĉe la kompanio Unilever.

**Arthur A.
Cook**

La Lingva Problemo en Industrio

En pli malgrandaj landoj kun lingvoj malmulte konataj, tradukado por industria kaj komercaj celoj rezultas problemojn specife diferencantajn disde la problemoj renkontataj en landoj por tiel diri "grand-lingvaj".

En Britujo kaj Usono, ekzemple, kiuj evidente apartenas al la dua kategorio, plej gravas la angligo de grandega nombro da alilandaj verkoj kun plejparte sciencaj temoj. En la pasinta jaro la Asocio de Fakaj Bibliotekoj, Novjorko, entreprenis enketon pri tradukado en Usono kaj Kanado. Ĝi trovis, ke sendiskute la plej ofte tradukataj verkoj en industrio estas tiuj pri kemio kaj kemia teknologio. Aliaj demandoj, kiujn respondis la enketo, rilatis al: la lingvoj nuntempe plej atentataj kaj estonte atentindaj; la fontoj de la tradukoj; ties kvanto; kaj ties kosto. Artikolo en *Chemical Week* (Kemia Semajno), eldonata de McGraw-Hill, de la 28-a de aprilo 1962 informis, ke el la 483 industriaj entreprenoj partoprenintaj la enketon 91% tradukis ĝis ioma grado el la germana. Sekvis

laŭorde la franca (83%), rusa (61%), itala (43%), hispana (34%), japana (20%). El ankoraŭ kvin aliaj lingvoj tradukis minimume 10% el la respondintaj entreprenoj.

Kiel lingvojn estonte atentindajn en teknika tradukado la industria grupo elektis: la rusan (72%), germanan (60%), japanan (50%), francan (35%), italan (16%), ĉinan (13%). Nur 5% el la respondintoj jam uzis ĉinajn tradukojn.

Signifoplene estas, ke ĉiuj lingvoj menciitaj estas jam en si mem "grandaj" lingvoj. Malgranda lando, kiu volas atentigi sin aŭ sian laboron al pli granda lando, devas tion fari per la lingvo de la pli granda lando, se neniu vere sensacia atingo jam altiris la atenton. Kontraste, la landoj grand-lingvaj havas mem la privilegion, diskonigi siajn verkojn alilanden en la propraj lingvoj.

Tio influas tre konkrete kaj tre evidente la haveblecon de tradukaj servoj, kaj sekve la administradon de tradukaj fakoj en industriaj entreprenoj.

Mia propra sperto rilatas al Nederlando, lando malgranda, kies lingvo ne estas multe konata aliloke, kaj kies popolo posedas ampleksan scion pri la lingvoj angla, germana kaj franca. Libroj, ĵurnaloj, gazetoj kaj raportoj en fremdaj lingvoj enfluas en la landon. Se por ili ekzistas merkato en la nederlanda lingvo, oni do tradukas ilin; se ne, do ili disvendiĝas eventuale en la originalo.

Tamen — kaj jen tre grava punkto — la fluon el Nederlando necesas traduki en aliajn lingvojn antaŭ ĝia eliro el la lando, kaj tio ĉi prezentas tre specifajn problemojn. Laŭ mia propra takso, la tradukoj en fremdajn lingvojn farataj de aŭ por la nederlandaj komerco kaj industrio ampleksas 80 ĝis 100 milionojn da vortoj jare, kio egalas al 1000 ĝis 1250 romanoj de normala longeco. El ĉio ĉi la pli granda parto neniam atingas la publikon, sed tiu parto, kiu publikiĝas, inkluzivas ĉ. 150 fremdlingvajn eldonaĵojn, plejparte anglalingvajn, krom ankaŭ bankaj kaj kompaniaj raportoj, ekspertizaĵoj kaj prospektoj. Ili traktas pri komerco, medicino kaj edukado, kaj pri sciencaj, teknikaj kaj kulturaj temoj.

la kostoj

La kosto de ĉio ĉi estas certe grandega, kaj se, kiel kutime, kompania traduka fako estas parto de entrepreno konscia pri kostoj, do ĝi devas pravigi sian ekziston, laborante laŭ buĝeto same kiel aliaj fakoj. La tradukadon, kiu ofte pritraktas abstraktajn kvantojn, necesas traduki en konkretajn ciferojn por kalkuli la koston por ĉiu vortomilo, laŭ la salajroj, la kosto de la oficejoj, ktp. La fako devas sukcese konkurenci kun eksterkompaniaj tradukaj servoj. Necesas trovi ekvilibron inter la laborigo de plentagaj tradukistoj unuflanke, kaj aliflanke la uzado de la servoj de sendependaj tradukistoj kaj agentoj, por specifaj lingvoj aŭ temoj. Tiurilate la artikolo en *Chemical Week* informis, ke en Usono la tradukojn por kompanioj prizorgas laŭ proksimume egala divido la esplorantoj rekte dungitaj de la kompanioj, kaj la komercaj agentejoj. Laŭ la sama artikolo, 39% el la kompanioj bezonis malpli ol 10 tradukojn jare, sed 11% utiligis pli ol 100 en unu jaro. Elspezis malpli ol 100 dolarojn jare 24% el la firmaoj, sed 18% elspezis pli ol 1000 dolarojn jare (inter kiuj estis 4%, kiuj elspezis pli ol 10.000 dolarojn), ekster la kostoj de internaj tradukistoj.

Laŭ mia scio, en neniuj aliaj okcidentaj landoj estas kolektitaj ankoraŭ tiel detalaj informoj, kvankam ili estas ja nur bazaj faktoj.

La kompania traduka fako, kiun mi estras, "produktas" ĉ. 4.500.000 vortojn jare, tradukante el dek tri diversaj lingvoj en kvar ling-

vojn: en la anglan, germanan, francan kaj nederlandan laŭ ordo de graveco. En ĝi laboras kaj eksterlandanoj kaj nederlandanoj, kiuj posedas bonajn kvalifikaĵojn por la diversaj lingvoj. Ĝi servas al sepdek kvin fakoj kaj filioj, el kiuj la plimulto laboras pri specifaj kampoj. La kvanto de la materialoj ricevataj el similaj fakoj aŭ por traduko en la saman lingvon ne sufiĉas por pravigi specialan disdividon de la laboro. Tial — iom strange en la hodiaŭa mondo — ni devas celi al malspecialiĝo, kaj pli grandajn malfacilaĵojn kaŭzas nescio pri la temoj, ol nescio pri la lingvoj. Povas okazi, ke tradukisto por la franca lingvo devas pritrakti ĉiajn temojn inter esploroj de pura kemio kaj la plej komplikaj juraj aferoj, simple pro tio, ke la kvanto de la tradukoj en tiun lingvon estas multe pli malgranda, ol en la anglan.

Kvankam tradukisto en tia kompanio devas esti tre diverskapabla, mi ne prezentu tamen tro malhelan bildon. En la fakoj, por kiuj li laboras, la specialistoj kutime ne scias sufiĉe la francan por povi fari mem tradukon, sed ĉi tie en Nederlando — dank' al la gravigo de lingva instruado en la nederlanda eduka sistemo — ili scias sufiĉe da teknikaj terminoj por povi helpi. Tiu interhelpo de la diversaj scioj estas nepre kondiĉo por sukcesa tradukado.

Kvankam ĝi estas malgranda, Nederlando enhavas la ĉefkontorojn de pluraj el la plej grandaj komercaj entreprenoj de la mondo. Ĝi estas unu el multaj pli malgrandaj landoj, kiuj ĝis la ĝenerala kaj efika adopto de internacia lingvo restos neeviteble en malavantaĝa pozicio en siaj traktadoj kun la lingvaj gigantoj.

Kion ajn la industria tradukisto opiniu persone pri la konfuzaĵoj de multelingveco, li tamen devas doni tiujn servojn, kiujn postulas de li la aktualaj cirkonstancoj en senkompromise praktika mondo diverslingva, loĝata de materialismaj unulingvaj komercistoj, kiuj liveras siajn varojn al vastaj merkatoj kun milionoj da unulingvaj aĉetantoj.

Samtempe kun la kresko de specialiĝo en la sciencoj, la nivelo de lingvaj scioj ŝajne malaltiĝas. Krome, la direkto de lingvo-instruado ne ĉiam koincidas kun la bezonoj de la industrioj de kiuj finfine dependas nia ekzisto.

La tezoj, kiujn mi diskutis, meritas pli multe da atento, ĉar laŭ mia konvinkiĝo la graveco de tradukado en kaj por la industrio kreskados kune kun la kresko de internacia komunikado kaj la plivastiĝo de la merkatoj. La pli granda parto de tiu traduko okazas en la kulisoj, laŭ la bezonoj de malgrandaj grupoj en specifaj industrioj. Pro tio ankoraŭ malmulto estas skribita pri la temo, kaj pliaj esploroj sur pli vasta kampo ol tiu, pri kiu mi kompetentas, povus doni fruktojn.

La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas fakulo pri neorganika kemio kaj speciale interesiĝas pri la problemoj de scienca dokumentado. Ĉi tie li prezentas la ĉefajn problemojn, kiuj obstaklas la enkondukon de internacia lingvo en la sciencan. Kvankam Profesoro Trimble mem scias Esperanton, la artikolo originale aperis en la angla lingvo en la numero 29/30 de "International Language Review" (P.O. Box 393, Denver 1, Colorado, Usono).

Kemiisto Frontas al Babelo

Profesoro R. F. Trimble

Kemia Fakto, Universitato de Suda Illinois, Usono.

En tiu ĉi artikolo mi volus pritrakti kelkajn lingvajn problemojn, kiujn frontas kemiisto, uzante la kemian literaturon, kaj konsideri, kiamaniere internacia lingvo povus helpi. Oni bonvolu kompreni, ke mi verkas el vidpunkto de kemiisto, de kemiisto denaske anglalingva, kaj de kemiisto ne industria sed universitata.

Kemiisto uzas la literaturon por du ĉefaj celoj: (1) por resti ĝisdate informita pri aktualaj fakaj eltrovoj, precipe en tiuj sferoj, kiuj rilatas al liaj propraj esploroj, kaj (2) por ekscii, kio estas jam farita pri difinita problemo (retrospekta serĉado). Por ambaŭ celoj necesas specialaj helpiloj. Inter ili elstaras la *Chemical Abstracts* (CA — Kemiaj Resumoj), kiu jam de 1907 celadas liveri resumojn de ĉiuj sciencaj artikoloj el la tuta mondo, kiuj enhavas novajn kemiajn informojn. Tralegante la koncernajn sekciojn de CA (ekzemple, pri Analiza Kemio, Elektrokemio, k.s.) oni povas akiri bonan koncepton pri la esploraj laboroj pri difinita kampo de kemio, faritaj dum la pasintaj kvin ĝis dek du monatoj. Per bonegaj indeksoj laŭ temo,

aŭtoro kaj formulo oni retrovas sen malfacilaĵoj studojn publikigitajn pri kiu ajn temo dum la pasintaj 55 jaroj. Ekzistas ankaŭ similampleksa germana resuma revuo *Chemisches Zentralblatt* (Kemia Centro-folio). Ĝi datiĝas de la jaro 1830-a kaj tial por iuj retrospektaj serĉoj ĝi estas pli bona ol CA. La rusa resuma revuo *Referativnĵi Ĵurnal Ĥimija* (Dokumenta revuo de kemio) fondiĝis nur en la jaro 1956-a kaj tial ne estas sufiĉe malnova por retrospekta serĉado.

Bonvolu rimarki, ke la supraj konstatoj trudas al la kemiisto la bezonon legi en la angla aŭ germana lingvo, kaj prefere en ambaŭ. Kompenso tamen li ricevas resumon pri la tuta kemia literaturo, sendepende de la originalaj lingvoj uzitaj. Lerninte unu lingvon li atingas resumojn de artikoloj verkitaj en 52 lingvoj, kaj iagrade li povas laŭplaĉe elekti tiun unu lingvon, kiun li lernu. La bezono, ke ekzistu CA, tamen ne devenas el la multeco de la lingvoj, sed el la grandega kvanto de la materialoj publikigitaj.

Kompreneble, la bezono pritrakti grandan nombron da lingvoj kreas problemojn por CA. Necesas resum-verkistoj kun plej diversaj lingvaj kaj teknikaj kvalifikoj, ekzemple pri metalurgio kaj la hungara lingvo, aŭ biokemio kaj la rumana, ktp. Evidente, estus pli facile, se ĉiuj artikoloj estus verkitaj en unu sola, ĉie komprenata lingvo. Tiel ĉiu ajn metalurgia kemiisto povus verki resumon de metalurgia artikolo, sendepende de la nacieco de la aŭtoro.

Estas eble pli realece, imagi la uzadon de internacia lingvo por resume artikolojn verkitajn en naciaj lingvoj. Tiel ni povus legi en internacia lingvo resumojn pretigitajn de hungaraj metalurgiistoj aŭ rumanaj biokemiistoj. Tia situacio estus pli bona ol la nuna nur en tiu okazo, se la supozita internacia lingvo estus pli facila kaj pli disvastigita, ol estas nun la angla, germana aŭ rusa lingvo.

Ni imagu, ke ni povos ĝis la venonta jaro enkonduki internacian lingvon por ĉiuj artikoloj kaj resumoj. Estos pli facile, prepari resumojn, kaj la kemiistoj pli facile restos informitaj pri la nova literaturo. Sed kion fari pri la problemoj, kiujn kaŭzas retrospekta serĉado? La 55 jarkolektoj de CA ankoraŭ restos en la angla lingvo. Mi simple ne povas imagi, ke estos eble traduki tiun vastan kvanton da materialoj antaŭ la efektiviĝo de Utopio. Ankoraŭ necesas, ke la kemiistoj scipovu legi krom la internacia lingvo ankaŭ la anglan (aŭ germanan). ¹⁾

Pli grava estas la problemo de indeksoj; ĉi tiu tuta materialo estas uzebla nur pere de diversaj indeksoj. Laŭteman indekson ne eblas traduki, kaj do la ŝlosilo de ĉi tiu materialo devas resti en la angla lingvo. Cetere mi dubas, ĉu ekzistas konstruita lingvo, kiu jam evoluigis

la necesan teknikan terminaron por verki kemiajn resumojn aŭ por indiksi ilin.²⁾ En ligo kun tio, unu lastatempa novaĵo en kemia dokumentado povus interlingvistojn. La Internacia Unuiĝo por Pura kaj Aplikata Kemio antaŭnelonge adoptis simbol-sistemon, kiu permesas priskribi kemian strukturon per unulinia kombino de literoj, ciferoj kaj interpunkciaj signoj. Tia skribaĵo povas anstataŭi sistemigitajn terminojn por trukarta konservo de informoj. Tian koncizan, senvortan sistemon kiu ajn lingvo povus uzi anstataŭ la normala terminaro. Oni jam proponis pli ol unu tian sistemon, kaj kelkaj kemiistoj favoras aliajn sistemojn ol tiu, kiun adoptis IUPAK. Tiun situacion la interlingvistoj verŝajne pli bone povas kompreni, ol aliaj.

Okazas ankaŭ, ke kemiistoj devas formeti la revuojn de resumoj kaj sin turni al la originalaj artikoloj. Kiel semantikistoj volonte atentigas, mapo ne estas la teritorio, kiun ĝi prezentas; resumo ne povas anstataŭi la originalon. En la 1958-a jaro CA resumis artikolojn verkitajn en 52 diversaj lingvoj. La kutima (*en Usono - noto de red.*) postulo, ke doktoriĝanto sciu la germanan kaj francan aŭ rusan, povus naski la naivan supozon, ke kemiisto povos legi nur 6% el la faka literaturo (t.e. ĉirkaŭ 2% por ĉiu lingvo). Fakte, tamen, ĝi permesas multe pli, kiel tion montras la tabelo.

Oftecoj de la lingvoj uzataj en kemio

(Laŭ 10-procenta hazardelekto el la volumo 52-a (1958) de CA. Patentoj ne estas inkluzivitaj.)

Angla	4823	50,49%
Rusa	1605	16,80%
Azerbajĝana	2	
Bulgara	14	
Ukrajna	19	
Bjelorusa	4	
Germana	928	9,72%
Japana	583	6,10%
Franca	524	5,48%
Itala	342	3,58%
Ĉeĥa	155	1,62%
Pola	145	1,52%
Hispana	97	1,02%
Rumana	78	0,82%
Ĉiuj aliaj*	272	2,85%
Sume	9552	100,00%

* Inkluzivas, laŭvice, la hungaran, ĉinan, serbo-kroatan, portugalan, nederlandan, skandinaviajn (kune), finnan, grekan, latvan, afrikansan, estonan, gaelan, hebrean kaj turkan.

La angla, germana kaj franca lingvoj ampleksas kune 65% de la literaturo, kaj la angla, germana kaj rusa kune 77%. La angla, evidente, jam bone komencis la konkuron por fariĝi la

internacia lingvo de la kemio. Tio precipe validas, se ni konsideras la ekziston de CA. La angla, la germana kaj la rusa kune konsistigas sufiĉe efikan triopon por kemia komunikado. Kompreneble, oni foje renkontas artikolojn ankaŭ en la japana aŭ itala aŭ pola lingvo. La tradukigo de iu artikolo povas postuli multe da mono kaj da tempo, kaj en tiaj okazoj la valoro de internacia lingvo fariĝas tre klara. Tio tamen okazas multe malpli ofte, ol oni eble povus atendi. Universale uzata internacia lingvo por skriba scienca komunikado estus certe tre dezirinda, sed nuntempe la bezono ne estas tre urĝa, kaj la interlingvistoj laŭŝajne ankoraŭ ne frontis la problemojn, kiujn ĝia enkonduko kreus rilate al retrospekta serĉado.³⁾

Notoj redaktoriaj

1) Kvankam en aliaj fakoj (ekzemple psikologio) retrospekta serĉado ne estas tiel grava parto de la scienca laboro, kiel en la kemio, tamen la aŭtoro ja atentigis unu el la plej gravaj problemoj, kiujn necesas solvi por la enkonduko de la Internacia Lingvo en la sciencon. Laŭ sugesto farita en la 1-a Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco (Kopenhago, 1962), estus dezirinde observadi la evoluon de aŭtomata (permaŝina) tradukado kun la espero, ke ĝia perfektigo permesos fine traduki en Esperanton ankoraŭ en antaŭvidebla estonteco ne nur la 55 kolasajn jarkolektojn de *Chemical Abstracts*, sed ankaŭ la tutan sciencon literaturon de la mondo.

2) Estas tute certe, ke la aŭtoro ne konas la diversajn kemiajn artikolojn kaj verketojn, eldonitajn en Esperanto, precipe en Japanujo, nek la ses kemiajn terminarojn ĝis nun aperintajn laŭ CED Dok. E/V/1, nek la diversajn kemiajn periodaĵojn, en kiuj aperis artikoloj aŭ resumoj en Esperanto laŭ CED Dok. E/IV/1 kaj E/IV/2. Aliflanke, kiam oni konsideras, ke ankoraŭ ĉiam en la angla kaj aliaj naciaj lingvoj aperadas abunda artikolaro pri la problemoj de kemia terminologio (i.a. pri la diferencoj inter usona kaj brita uzoj de la anglalingvaj terminoj), tiam oni devas konstati, ke por niaj kemiistoj-Esperantistoj restas grandega tasko plenumenda por pli intense uzadi la lingvon por fakaj celoj kaj por tiamaniere evoluigi la Esperantan terminaron. Tia evoluigo de la teknika terminaro preter la ĝisnuna stadio estas antaŭkondiĉo por la tradukado en Esperanton de ekzistantaj nacilingvaj resumrevuoj kaj aliaj dokumentoj; siavice, tiu tradukado estas antaŭkondiĉo por la ĝenerala enkonduko de Esperanto en la kemion kaj aliajn sciencojn. Konsekvence ni devas solvi unue la problemon, kiamaniere plioftigi la eldonadon de fakaj materialoj en la Internacia Lingvo, por tiel stimuli la evoluadon de la teknikaj terminoj.

3) La fina frazo en la artikolo enhavas tri apartigeblajn konkludojn. Pri la unua, ke internacia lingvo estas dezirinda, ni ĉiuj konsentas. La dua konkludo, ke "la bezono ne estas tre urĝa", povas esti valida por la aŭtoro, usona kemiisto. Kiel montras, aliflanke, la artikolo de S-ro Cook en ĉi tiu eldono de "Esperanto", la lingva problemo en scienco kaj industrio estas tre multekosta, precipe por la pli malgrandaj landoj kaj precipe ankaŭ por la malpli evoluintaj landoj, por kiuj la supereco de la angla lingvo signifas gravajn malavantaĝojn. La tria konkludo, ke ni ankoraŭ ne frontis la problemojn de retrospekta serĉado en la scienca literaturo, ŝajnas tute prava, kaj plene meritas nian atenton.

Celebrado de la 15-a Datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

Konforme al la Rezolucio de la 7-a de decembro 1962 de la Ĝenerala Asembleo de U.N., la Sekretariato de UNESKO invitis ĉiujn organizaĵojn en konsultaj rilatoj celebri per ĉiuj eblaj rimedoj la 15-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj la 10-an de decembro 1963. UEA, kiu en sia Statuto deklaris, ke la respekto de la Homaj Rajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo, akceptis la inviton kaj pri tio informis la Sekretariaton de UNESKO.

La ĝenerala sekretario de UEA jam sendis al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, komitatanoj de UEA, informaj oficejoj kaj redakcioj de esperantlingvaj gazetoj cirkuleron kun detaloj pri la formoj de celebrado kaj kelkaj konsiloj. Tre verŝajne la landaj asocioj kaj la fakaj organizaĵoj jam komunikis la enhavon de tiu cirkulero al siaj respektivaj lokaj grupoj kaj naciaj branĉoj. Tial ĉi tie ŝajnas oportune memorigi nur plej koncize, ke la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj iliaj naciaj branĉoj, la regionaj societoj kaj lokaj grupoj, kiel ankaŭ unuopaj esperantistoj povas utiligi unu aŭ plurajn el la sekvantaj formoj:

1. Memorigi la Deklaracion per prelego aŭ alimaniere en unu el la kunsidoj aŭ kunvenoj kiel eble plej proksime al la 10-a de decembro. Tiucele oni povas utiligi la tekston de la U.D., publikigitan en tiu ĉi numero de "Esperanto", eventuale ĉerpi pliajn informojn el la ĉapitro VIII de la libro "Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo".
2. Distribui la tekston de la U.D., la fotoafiŝojn eldonitajn de UNESKO en Esperanto kaj eventuale aliajn materialojn.
3. Publikigi artikolojn kaj informojn en la esperantlingvaj gazetoj.

4. Prizorgi ke la tutlanda kaj regiona nacilingva gazetaro raportu pri la aranĝoj aŭ publikigu artikolojn pri la Homaj Rajtoj.

5. Ĉiu profesoro, instruisto, pastro, ĵurnalisto aŭ alia aganto en kontakto kun pli vasta publiko povas facile memorigi la datrevenon en sia medio.

6. Honorigi unuopulojn aŭ grupojn, kiuj estis aparte aktivaj en la diskonigo de la U.D. aŭ en la laboro por la realigo de la Homaj Rajtoj kaj Liberecoj.

7. Se en la lando, regiono aŭ loko formiĝis specialaj komitatoj por la celebrado, aliĝi al tiuj komitatoj, partopreni en iliaj aranĝoj, kontribui ĝis maksimumo al la sukcesigo de la celebrado.

8. Nepre sendi telegramon aŭ mallongan leteron de solidareco kun bondeziroj al la Sekretariato de U.N. en New York kaj al tiu de UNESKO en Parizo.

Pri ĉio farita necesas sendi koncizajn raportojn kun precizaj informoj laŭ la supraj punktoj al la landaj asocioj, respektive al la sekretarioj de la fakaj organizaĵoj, kiuj siavice sendos raportojn al UEA. Nur preciza kaj ĝustatempa raportado ebligas al UEA sendi objektivan raporton pri la celebrado al la Sekretariato de UNESKO.

Apenaŭ necesas emfazi la gravecon de tiu ĉi datreveno. Tial oni prave povas esperi, ke ĉiu Esperanto-organizaĵo kaj ĉiu unuopa esperantisto kontribuos ĝis maksimumo, por ke la tuta Esperanto-Movado digne memorigu la Universalan Deklaracion.

I. L.

Pri la Universala Deklaracio

El ĉiuj dokumentoj, kiuj reflektas la longan historion de la lukto por emancipiĝo de la Homo el la ĉenoj de sklaveco, servuteco, politikaj kaj aliaj premoj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj prezentas la kulminon ĝis nun konkeritan en kadroj mondaj.

Tiu ĉi ĉarto de liberecoj kaj rajtoj, kiu por la unua fojo aperas komplete ankaŭ en la Internacia Lingvo, konsistas el Solena Enkonduko kaj teksto de tridek artikoloj. Kvankam la teksto mem de la Deklaracio ne estas formale subdividita, tamen en ĝi estas distingeblaj tri partoj. La unua (art. 1-21) proklamas la jam klasikajn rajtojn kaj liberecojn, bazitajn ĉefe sur la grandaj principoj de la Franca Revolucio: libereco, egaleco, frateco. La dua parto (art. 22-27) difinas la novajn, ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn. La lastaj tri artikoloj, nomataj ankaŭ tegmento-artikoloj, ĉar ili iamaniere kovras la tutan Deklaracion, formas la trian parton, kiu entenas kelkajn regulojn pri ĝiaj signifo kaj interpretado.

El formale-jura vidpunkto la Universala Deklaracio havas karakteron de rekomendo kaj kiel tia ĝi ne estas deviga. Tamen, — kiel la subskribinto klopodis pruvi en la libro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* kaj ankaŭ en studo speciale verkita por U.N.E.S.C.O. — ĝia enhavo estas deviga kaj, efektive, en la lastaj jaroj ĝi estis ĉiam pli alvokata antaŭ kortumoj kaj tribunaloj. Tio, kompreneble, neniel signifas, ke ĉiuj proklamitaj rajtoj kaj liberecoj estis ĉiam kaj ĉie observataj,



bedaŭrinde, tro ofte ili ankoraŭ estas piedpremataj. Sed, malobservo de kiu ajn jura preskribo ne forprenas de ĝi la juran kvaliton.

Senkonsidere al tiu aspekto, la Universala Deklaracio havas grandegan moralan valoron. En ĝi estas rekonita la esenca egaleco de ĉiuj homoj kaj difinitaj iliaj rajtoj en ĉiuj partoj de la terglobo sen kia ajn diskriminacio. Tial ĝi simbolas la tuthomecon kaj universalecon de la mondo, kiu apartenas al la Homo super ĉiuj landlimoj, haŭtkoloroj,

lingvoj kaj konvinkoj. Por milionaj amasoj kaj por ĉiuj vere intelektaj elitoj, konsiderantaj la homon antaŭ ĉio Homo, la Universala Deklaracio estas unu el la potencaj instrumentoj por la iom-post-ioma, pacienca kaj malfacila konstruado de la nova mondo de plenaj egaleco, libereco kaj justeco, en kiu la feliĉo de la tuto baziĝos sur la feliĉo de ĉiuj unuopuloj, kaj tiu de la individuo rezultos el la feliĉo de la tuto.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

"Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturen vivon de la komunumo" (Art. 27 de la Deklaracio): bulgara junulo muzikas per sakfajlo.

ANTAŬKONSIDEROJ

Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,

Pro tio, ke malagnosko kaj males-timo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencon de la homaro, kaj ke la efektiviĝo de tia mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberiĝon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinarnaj homoj,

Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,

Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco,

Pro tio, ke la Membroj-Ŝtatoj sin devigis atingi, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, la antaŭenigon de universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,

Pro tio, ke komuna kompreno pri tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas esence grava por plena realigo de tiu sindevigo,

Tial, Nun,

LA ĜENERALA ASEMBLEO proklamas

TIUN ĈI UNIVERSALAN DEKLARACION DE HOMAJ RAJTOJ kiel komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj, por tio, ke ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante atentante ĉi tiun Deklaracion, per instruado kaj edukado strebu al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj, kaj per laŭgradaj paŝoj naciaj kaj internaciaj certigu ilian universalan kaj efektivan agnoskon kaj observadon, same tiel inter la popoloj de la Membroj-Ŝtatoj mem, kiel inter la popoloj de teritorioj sub ilia jurisdikcio.

UNIVERSALA DEKLARACIO

Artikolo 1. Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus kondukti unu al alia en spirito de frateco.

Artikolo 2. Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Plie, nenia diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, ne-sinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.

Artikolo 3. Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Artikolo 4. Neniu estu tenata en sklaveco aŭ servuteco; sklaveco kaj sklavkomerco estu malpermesitaj en ĉiuj siaj formoj.

Artikolo 5. Neniu suferu torturon aŭ kruelan, nehuman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon.

Artikolo 6. Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.

Artikolo 7. Ĉiuj homoj estas jure egalaj, kaj rajtas sen diskriminacio al egala jura protekto. Ĉiuj rajtas ricevi egalan protekton kontraŭ kia ajn diskriminacio, kiu kontraŭas tiun ĉi Deklaracion, kaj kontraŭ kia ajn instigo al tia diskriminacio.

Artikolo 8. Ĉiu rajtas ricevi de la kompetentaj naciaj tribunaloj efikan riparon pro agoj, kiuj kontraŭas la fundamentajn rajtojn, kiujn li havas laŭ la konstitucio aŭ la leĝoj.

Artikolo 9. Neniu suferu arbitrajn areston, malliberigon aŭ ekzilon.

Artikolo 10. Ĉiu en plena egaleco rajtas je justa kaj publika proceso antaŭ sendependa kaj senpartia tribunalo, por prijuĝo de liaj rajtoj kaj devoj kaj de kiu ajn kriminala akuzo kontraŭ li.

Artikolo 11. (1) Ĉiu akuzita pro punebla faro rajtas, ke oni supozu lin senkulpa, ĝis oni pruvos laŭleĝe lian kulpon en publika proceso, en kiu li ricevis ĉiujn garantiojn necesajn por sia defendo.

(2) Neniu estu konsiderata krimkulpa pro kia ajn ago aŭ neago, kiu ne konsistigis puneblan faron, laŭ nacia aŭ internacia juro, en la tempo, kiam ĝi estis farita. Same tiel, ne estu aljuĝita pli severa puno ol tiu, kiu estis aplikebla en la tempo, kiam la punebla faro estis plenumita.

Artikolo 12. Neniu suferu arbitrajn intervenojn en sian privatecon, familion, hejmon aŭ korespondadon, nek atakojn kontraŭ sia honoro aŭ reputacio. Ĉiu rajtas ricevi juran protekton kontraŭ tiaj intervenoj aŭ atakoj.

Artikolo 13. (1) Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn ŝtato.

(2) Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon.

Artikolo 14. (1) Ĉiu rajtas peti kaj ricevi en aliaj landoj azilon kontraŭ persekuto.

(2) Tiu rajto ne estas alvokebla en kazoj de persekutaj akuzoj mal-false levitaj pro ne-politikaj krimoj aŭ pro agoj kontraŭaj al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 15. (1) Ĉiu rajtas havi ŝtatanecon.

(2) Al neniu estu arbitre forprenita la ŝtataneco, nek rifuzita la rajto ŝanĝi sian ŝtatanecon.

DE HOMAJ RAJTOJ *

Artikolo 16. (1) Plenaĝaj viroj kaj virinoj, sen ia ajn limigo pro raso, nacieco aŭ religio, rajtas edziĝi kaj fondi familion. Iliaj rajtoj estas egalaj koncerne la geedziĝon, dum la geedzeco kaj koncerne eksedziĝon.

(2) Geedziĝo okazu sole laŭ libera kaj plena konsento de la geedziĝintoj.

(3) La familio estas la natura kaj fundamenta grupunu de la socio, kaj ĝi rajtas ricevi protekton de la socio kaj de la Ŝtato.

Artikolo 17. (1) Ĉiu rajtas proprieti havaĵon, kaj sola kaj en asociiĝo kun aliaj.

(2) Al neniuj estu arbitre forprenita lia proprieto.

Artikolo 18. Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio; tiu ĉi rajto inkluzivas la liberecon ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj liberecon manifesti, ĉu sola ĉu kune kun aliaj, ĉu publike ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado.

Artikolo 19. Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimo; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.

Artikolo 20. (1) Ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo.

(2) Neniu estu devigita aparteni al asocio.

Artikolo 21. (1) Ĉiu homo rajtas partopreni la regadon de sia lando, aŭ rekte aŭ pere de libere elektitaj reprezentantoj.

(2) Ĉiu rajtas je egala aliro al publika servo en sia lando.

(*) Akceptita kaj proklamita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 10-an de decembro 1948.

(3) La volo de la popolo estu la bazo de la aŭtoritato de la registaro; tiu volo estu esprimata per regulaj kaj aŭtentikaj elektoj, kiuj okazu per universala kaj egala balotrajto, kaj per sekreta voĉdono aŭ ekvivalentaj liberaj voĉdonaj proceduroj.

Artikolo 22. Ĉiu, kiel membro de la socio, havas rajton je socia sekureco kaj povas postuli la realigon, per naciaj klopodoj kaj internacia kunlaboro, kaj konforme al la organizo kaj disponeblaj rimedoj de ĉiu Ŝtato, de tiuj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kiuj estas nepre necesaj por lia digno kaj por la libera disvolviĝo de lia personeco.

Artikolo 23. (1) Ĉiu havas rajton je laboro, je libera elekto de sia okupo, je justaj kaj favoraj laborkondiĉoj kaj je protekto kontraŭ senlaboreco.

(2) Ĉiu, sen ia ajn diskriminacio, rajtas ricevi egalan salajron pro egala laboro.

(3) Ĉiu, kiu laboras, rajtas ricevi justan kaj favoran kompenzon, kiu certigu por li mem kaj por lia familio ekziston konforman al homa digno, kaj kiun suplementu, laŭ necese, aliaj rimedoj de socia protekto.

(4) Ĉiu rajtas formi kaj aliĝi sindikatojn por protekto de siaj interesoj.

Artikolo 24. Ĉiu havas rajton je ripozo kaj libertempo, inkluzive racian limigon de la laborhoroj kaj periodajn feriojn kun salajro.

Artikolo 25. (1) Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive de nutraĵo, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj, kaj la rajton je sekureco en okazo de senlaboreco, malsano, malkapablo, vidvineco, maljuneco aŭ alia perdo de la vivrimedoj pro cirkonstancoj ekster sia povo.

(2) Patrineco kaj infaneco rajtigas al specialaj prizorgoj kaj helpo. Ĉiuj infanoj, egale ĉu ili naskiĝis en aŭ ekster geedzeco, ricevu saman socian protekton.

Artikolo 26. (1) Ĉiu havas rajton je edukado. La edukado estu senpaga, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadioj. La elementa edukado estu deviga. La teknika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla, kaj pli alta edukado estu egale akirebla por ĉiuj laŭ ties meritoj.

(2) Edukado celu la plenan disvolvigon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservo de paco.

(3) Gepatroj havas unuavican rajton elekti la specon de la edukado, kiun ricevu iliaj infanoj.

Artikolo 27. (1) Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturan vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciencon progreson kaj ĝiajn fruktojn.

(2) Ĉiu havas rajton je protekto de la moralaj kaj materialaj interesoj rezultantaj el eventualaj sciencaj, literaturaj aŭ artaj produktaĵoj, kiujn li aŭtoris.

Artikolo 28. Ĉiu havas rajton je socia kaj internacia organizo, en kiu la rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu Deklaracio povas esti plene realigitaj.

Artikolo 29. (1) Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu, sole, estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco.

(2) En la uzado de siaj rajtoj kaj liberecoj, ĉiu estu subigita sole al tiuj limigoj, kiuj estas jure difinitaj ekskluzive kun la celo certigi adekvatan rekonon kaj respekton por la rajtoj kaj liberecoj de aliaj kaj por konformiĝi al justaj postuloj de moralo, publika ordo kaj ĝenerala bonfarto en demokrata socio.

(3) Tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas en neniuj okazo efektivegaj kontraŭe al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 30. Neniu en ĉi tiu Deklaracio estu interpretita kiel implico, ke iu ajn Ŝtato, grupo aŭ persono iel ajn rajtas entrepreni ian ajn agadon aŭ plenumi ian ajn agon, kiu celus detrui kiun ajn el la rajtoj kaj liberecoj ĉi-ene difinitaj.

CED

**Centro de Esploro
kaj Dokumentado**

**77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo Telefono ARNold 9081**

GRAVA DOKUMENTO DE CED EN LA ANGLA

La prelego "La Lingva Problemo en Internacia Rilatoj", kiun Prof. D-ro Ivo Lapenna faris al la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, okazinta en aŭgusto 1962 en Kopenhago, kaj resumo de lia studo "Kelkaj Aspektoj de la Lingva Problemo en Internacia Publika kaj Kompara Juroj", prezentita al la sama Konferenco, aperis komence de tiu ĉi jaro en Esperanto kiel dokumentoj de CED A/II/1 kaj A/II/2. Tiuj du dokumentoj estis tuj senditaj al la landaj asocioj kaj komitatanoj de UEA kun la sugesto utiligi la tutan materialon aŭ parton de ĝi por similaj nacilingvaj dokumentoj. La samaj du dokumentoj aperis presite kiel Doc. A/II/1 kaj Doc. A/II/2 en la angla lingvo. Ambaŭ dokumentoj, kunigitaj en unu broŝuro, enhavas plurajn ilustraĵojn, liston de adresoj, ĉe kiuj oni povas ricevi informojn pri la Internacia Lingvo, superrigardon de la gramatiko kaj sciigon pri kelkaj lernolibroj kaj vortaroj. En la aldonoj troviĝas bibliografio, kelkaj ekzemploj de juraj terminoj tradukitaj en Esperanto, ekzemploj de tradukoj, en kiuj Esperanto funkciis kiel pontolingvo. La broŝuro havas 24 paĝojn en la kutima formato de 25 × 20 cm. Ĝi jam estas sendita al ĉiuj regulaj ricevantoj de la CED-dokumentoj, sed CED entute presigis 2.500 ekzemplerojn, tiel ke la restanta kvanto povas esti taŭge utiligita en la angle parolantaj landoj. Oni povas mendi la broŝuron ĉe la Libroservo de UEA je la prezo de 10 guldenoj (40 steloj) por 10 ekzempleroj.

Okaze de tiu ĉi eldonaĵo CED ricevis plurajn gratulojn de neesperantistaj organizaĵoj kaj unuopuloj el diversaj landoj. Karakteriza estas la letero de la 3-a de aŭgusto de Juĝisto Joseph Findley el Buchanan, Liberio, en kiu li, interalie, skribis: "Mi legis kun granda intereso kaj profunda simpatio vian prelegon... kaj mi gratulas al vi pro tiu tre ellaborita kaj detala traktado de la temo. Mi estas tiel tuŝita, ke mi skribas al vi tiun ĉi leteron por diri, ke mi interesiĝas pri Esperanto kaj dezirus ricevi ĉiujn informojn rilate la eblecon studi Esperanton kiel memlernanto hejme..." Kompreneble, CED donis al li kaj al pluraj aliaj la necesan helpon.

LETERO PRI ESPERANTO EN "THE UNESCO COURIER"

En la maja numero de "Esperanto", en la rubriko de CED, aperis la kompleta teksto de letero, kiun la ĝenerala sekretario de UEA sendis al la redaktoro de Kuriero de UNESKO kiel reago al letero, kiun iu Robert H. J. van Kuyk estis publikiginta en unu el la antaŭaj numeroj de tiu revuo. La redaktoro de Kuriero de UNESKO publikigis plurajn leterojn pri la sama demando en la postaj numeroj kaj, fine, en la junia numero de Kuriero de UNESKO aperis preskaŭ komplete, sur unu paĝo kaj triono, la menciita letero de la ĝenerala sekretario de UEA. Sur la sekvantaj unu paĝo kaj tri kvaronoj estas reproduktitaj kelkaj desegnaĵoj de Botticelli, kiuj ornamas la ĵus aperintan ĉefverkon de la monda literaturo, la Dia Komedio de Dante, en la esperanta traduko de G. Peterlongo (vidu la martan numeron de "Esperanto").

La Kuriero de UNESKO aperas en la angla, franca, hispana, rusa, germana, japana, araba kaj itala lingvoj entute en 500,000 ekzempleroj. Aparta varianto estas eldonata por Usono. Estas interese, ke en la rusa eldono ne aperis la letero nek la reproduktaĵoj de la desegnaĵoj de Botticelli, nek la komentoj, tre flataj, de la redaktoro de Kuriero de UNESKO pri la belega esperantlingva eldono de Dante, sed, anstataŭe, la rusa redaktoro publikigis artikolon de Akademiano Tihomirov pri la komenciĝoj de la slava skribo.

Post la publikigo de la letero CED ricevis multajn informpetojn pri la Internacia Lingvo.

ESPERANTO EN ALIAJ PUBLIKAĴOJ DE UNESKO

La Bulteno "Bibliografio, Dokumentado kaj Terminologio", kiun eldonas la Sekretariato de UNESKO en la angla, franca kaj hispana, publikigis en la n-ro 4 de julio 1963 informon pri la studo de Inĝ. R. Haferkorn "Sciencaj, Teknikaj kaj Aliaj Fakvortaroj en Esperanto", kiu aperis kiel Dok. E/V/1 en Esperanto kaj en la angla. Ankaŭ tiu ĉi dokumento vekis grandan interesigon kaj CED ricevis multajn mendojn. En la junia numero de "Orient-Occident", en kiu la Sekretariato de UNESKO publikigas informojn kaj novaĵojn pri la realigado de la Granda Projekto pri Reciproka Aprezado de Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj, aperis informoj pri la Esperantlingva eldono de la broŝuro de Georges Fradier "Oriento kaj Okcidento — Al Reciproka Kompreno" en la traduko de C. D. A. Capp. En la sama numero aperis informo pri la "UNESKO-Semajno" en Frostavallen, 1962, kun denova mencio de la

unua seminario "Oriento-Okcidento", organizita en 1959. Laŭ la arĥivo de CED, entute ĝis nun aperis en la publikaĵoj de UNESKO, aŭ en diversaj dokumentoj, 77 pli gravaj artikoloj, raportoj aŭ informoj pri la Internacia Lingvo. En tiu ĉi rubriko CED publikigis de tempo al tempo informojn pri tio. La lasta aperis en la decembra numero de "Esperanto" 1962.

MALLONGAJ INFORMOJ

La studo de D-ro G. F. Makkink "La Rikoltaĵo Depende de la Akvomastrumado de la Planto", aperinta en "Sciencaj Studoj" 1958, sur pp. 193—200 estas publikigita en la vietnama lingvo en la gazeto "Tin tuc hoat đông khoa hoc" (Novaĵoj pri Scienca Aktiveco)". Al sia kunlaboranto CED esprimas tutkoran gratulon.



S-ro D. Kennedy, unu el la plej sindonaj kaj aktivaj kunlaborantoj de CED, meritas apartan publikan dankon pro la granda laboro, kiun li plenumis plej precize kaj akurate, rilate la lernejojn, en kiuj Esperanto estis instruata en la lerneja jaro 1962/1963. La sekvanta enketo pri la lernejoj estos farita en la jaro 1964/1965.



Sen bonaj tradukantoj CED ne povus funkcii. Apartan mencion pro fidela laboro sur tiu ĉi kampo, seninterrompe ekde la fondiĝo de CED en 1952, meritas fraŭlino Suzanne Minault, la tradukantino de CED por la franca. En la lastaj jaroj multe helpis la laboron de CED la getradukantoj por la angla s-ro Edw. P. Ockey, Mag. W. Auld, Univ. asistento s-ro John C. Wells kaj Univ. asistentino f-ino Eleanor M. Higginbottom. Al ĉiuj getradukantoj CED esprimas koran dankon.



La Hungara Scienca Akademio, aŭdinte la raporton de Akademiano Prof. Korach "Kontraŭaĵoj kaj Konformaĵoj de la Teknikaj Sciencaj Lingvoj", decidis formi komisionon kun la celo ekzameni la uzeblecon de unueca internacia lingvo por sciencaj terminologiaj celoj. CED liveris al la Akademio dokumentan materialon pri la temo.



La Direktoro de CED estis elektita en julio, 1963, Honora Membro de la Kolombia Asocio de Studoj pri Internacia Politiko kaj Diplomatio pro liaj meritoj por proksimigo de la popoloj per la Internacia Lingvo. En 1955 la Direktoro de CED ricevis la premion de la Sveda Pac-Asocio.

Donacoj por CED

£ - \$ - p

La stato je la 25-a de marto	40- 4- 2
S-ro E. F. Dean, Britujo	5- 0- 0
Novzelanda Esperanto-Asocio, Novzelando	5- 0- 0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5- 0- 0
S-ro E. C. Page, Britujo	1- 0- 0
Donaco N. N., Britujo	1-11- 0
S-ro Fred Parker, Britujo	1- 0- 0
S-ro R. H. M. Markarian, Britujo	10- 0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5- 0- 0
S-ro J. Clayton, Britujo	1- 0- 0
S-ro J. Kosutek, Aŭstralio	1- 2- 0
S-ro H. Amaral, Portugalujo	5- 0
S-ro A. Burghardt, Germanujo	9- 0
S-ro H. Vestergaard, Svedujo	10- 5
S-ro E. F. Dean, Britujo	5- 0- 0
S-ro Fr. Lowitzer, Germanujo	6- 4
Itala Esperanto-Federacio, Italujo	8-10- 0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10- 5
S-ro D-ro H. Kunzel, Germanujo	18- 1
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10- 5
S-ro E. F. Dean, Britujo	5- 0- 0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5- 0- 0
Svisa Esperanto-Societo, Svislando	4- 2-10
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10- 5
Gesinjoroj Laurie, Britujo	2- 0- 0

La stato je la 30-a de septembro 1963 100- 0- 1

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenas ĝian laboron per donacoj. Oni facile rimarkos, ke en la supra listo la nomo de s-ro E. F. Dean, Britujo, aperas 6 fojojn, kaj tiu de s-ro H. V. Rasmussen, Danlando, 3 fojojn. Al ili denove tute specialan dankon. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

ne forgesu

DECEMBRO

10

TAGON DE LA HOMAJ RAJTOJ

montru

la serion de 12 specialaj fotoafiŝoj de UNESKO kun teksto Esperanta

mendu

ĉe la Centra Oficejo, sendante 4 rpk (5 steloj) por afranko.

Novaj Libroj

Ĉion ricevitan ni mencias. Verkojn por recenzo ni elektas inter la duope ricevitaĵoj. Neneŭtralajn eldonaĵojn ni senpartie resumas. *) ricevebla ĉe U.E.A.

LA NEHEROA HEROO

Kiel akvo de l' rivero, romano de Raymond SCHWARTZ. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. 488 p. 22 × 16 cm. Prezoj: broŝ. 11,40 gld. (45,6 st.), tolbind. 14,40 gld. (57,6 st.) Belliteratura serio n-ro 19/20.*

Longaj romanoj malabundas en nia originala literaturo. La unuaj, "Kastelo de Prelongo" kaj "Ĉu li?", eldonitaj antaŭ pli ol kvindek jaroj, donis sensacie romantikan bildon pri Francujo en la 19-a jarcento. La fono de la plej lasta, "Kiel akvo de l' rivero", kiu ĉiel superas siajn antaŭulojn, ankaŭ estas Francujo, sed ĉi-foje, kontraste, la verkinto, Raymond Schwartz, realisme rigardas sian landon kaj ĝiajn loĝantojn. Al sia konata spriteco, vortludemo, bonhumoro li aldonas seriozan temon, tiu de ordinara homo, kiu volas trankvile vivi sian vivon sed kiu, kiel preskaŭ ĉiuj ordinaruloj en Eŭropo, devas nevole partopreni du kruelajn militojn.

La iom mistera titolo "Kiel akvo de l' rivero" trafe resumas la tezon de ĉi tiu pensiga romano pri francoj kaj germanoj kaj iliaj interrilatoj dum la unua duono de ĉi tiu jarcento.

Ĉu la tezo estas prava, la leganto mem devas decidi. Ĝi almenaŭ klarigas la fatalismon kun kiu multaj homoj, ne nur francoj kaj germanoj, akceptis kaj ankoraŭ akceptas sian ŝajne neeviteblan destinon.

Laŭ tia filozofio la ĉefaj roluloj de la romano ne povas esti tre heroaj individuoj, sed tio estas unu el ĝiaj plej interesaj karakterizaĵoj. Tiom da romanverkistoj faras siajn homojn heroaj aŭ tragediaj figuroj, kaj la ordinara homo estas nek unu nek la alia. Li sekvas la fluon kaj, anstataŭ naĝi kontraŭ ĝi, maksimume direktas sin flanken al la trankvila bordakvo. Tion faras nia heroo. Li ne volas lasi sian amatinon en Berlino en 1914, tamen li reiras al sia patrolando Francujo, kaj poste atendas tridek jarojn ĝis hazardo rekondukas ŝin al li. Li ne volas militiri, sed li

fariĝas soldato. Li volas helpi kontraŭ la nazioj, sed fuĝas, kiam helpado fariĝas danĝera, eĉ lasante sian amatinon en la manoj de la Gestapo, kiam eblis savi ŝin. Tute ne heroo viro, sed ankaŭ ne mal-kuraĝulo, kaj la leganto sentas simpatian al li, ĉar li estas vera homo.

Por apogi tiun filozofian teorion, ke ni estas kaptitoj de nia ĉirkaŭaĵo, Schwartz majstre rekreas ĉirkaŭaĵon de antaŭ kvindek jaroj por ni. Geedziga festo en franca provinco, promeno trans la tiaman francgermanan landlimon, studenta festenvespero en Parizo kaj simila pli ceremoniplena drinkvespero en Berlino, kristnaska festo ĉe germana familio, estas nur kelkaj el la okazaĵoj, kies realeca impresado estas tiel forta, ke ni kredas mem partopreni ilin, kvankam ili okazis antaŭ kvindek jaroj. Post tiel aŭtentikaj priskriboj la leganto bedaŭras, ke la romano ne estas pli longa por ke li havu similan serion de bildoj pri la jaroj inter 1918 kaj 1938. La jaroj 1913-1914 okupas la unuajn 352 paĝojn de la romano, sed paĝo 358 enkondukas 1939, kaj malmultegaj linioj estas dediĉitaj al okazaĵoj inter 1914 kaj 1939. Oni scivolas pri la mankantaj jaroj kaj precipe pri la mistera dufoje menciita Simone, kiu evidente ludis iom gravan rolon en la vivo de la "heroo". La lastaj 120 paĝoj de la libro ja donas al ni liajn aventurojn inter 1939 kaj 1946, sed la komenco de la romano estas tiel detalplena, ke estas bedaŭrinde, ke lia tuta vivo ne estas samproporcie prezentita al ni.

Estas kvazaŭ oni tenas en la manoj albumon de familiaj foto-grafaĵoj, el kiu la meza duono estas elŝirita. Tiu opinio, ke proporcio mankas inter la fruaj kaj postaj jaroj, estos eble ne sentata de ĉiu. Tamen, espereble iam Raymond Schwartz donos al ni la ellasitajn paĝojn por ke ni sciu la kompletan historion de la aminda, se ne tute admirinda, Pierre.

Edward Ockey (Londono)

Senelirejo de Nguyen Kong HOAN, trad. Esperanto-Klubo Hanojo, eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1963. 278 p. 19 × 13 cm. Prezo: 3,— gld. (12,— st.) Romano.*

La vjetnama aŭtoro Nguyen Kong Hoan estis fekunda verkisto kaj antaŭ kaj post la Rezistado. Tiun ĉi romanon li eldonigis unue en 1938, sub la franca reĝimo. Ĝi estas, precipe en tiu periodo, sufiĉe aŭdaca verko, konscie ekpozicianta kaj severe denuncanta la tiamajn instancajn kutimojn.

Temas pri kelkmonata periodo en la vivo de vilaĝano, ekde la naskiĝo de lia unua filo, en mizere malriĉan, tamen sendependan familion; sekvas tamen la iompost-ioma subfoso de liaj financaj rimedoj fare de vilaĝa grandbienulo, kune kun ĥolera epidemio, kiu fine forprenas de li kaj vivrimedojn kaj familion.

La rakonto estas rapida kaj eventoplana; per ĝia fakteca stilo oni ricevas klaran impreson pri la grado de korupto inter tiamaj potenculoj. Mankas tamen preciza karakterizo de la koncernaj personoj; ili restas pli tipaj ol individuaj. Pro tio malpliigas kompreneble la denunca efiko; la severe priskriba rakonto ŝajnas ne plu aktuala kaj trafa sed iomete statistikeca. Kvankam pro tio oni ne povas nomi ĝin elstara, ĝi restas tamen kompetenta kaj, el socia vidpunkto, tre interesa verko.

Eleanor M. Higginbottom
(Londono)

Bonvolu esti mia amiko! de Ella GIBSON. Eld. Esperanto Press, Ontario, 1963. 57 p. 16 × 10 cm. Prezo 2 gld (8 st). Tri porinfanaj teatraĵetoj, parte anglalingvaj.*

Bonaspekta libreto, lingva fiden-da (escepte de unu du eraroj en la klarigoj). Bedaŭrinde, por fidele adapti la unuan teatraĵeton naci-lingven oni devos bone scipovi la anglan; ankaŭ mankas tie fonetikaj notoj pri la frazoj en la franca, rusa kaj hispana. Sed tiuj estas malgrandaj mankoj, la celo de l' libro — vekti esperantan intereson ĉe neesperantista ĉeestantaro per facilaj teatraĵetoj, kiujn infanoj (6—14-jaraj proksimume) plezure kaj facile ludos — estos certe plene atingita. La unua teatraĵeto estas ĉefe nacilingva kun iom da Esperanto. La dua estas esperanta kun anglaj/esperantaj klarigoj. La tria estas tute en Esperanto, ĝi estas baze neoriginala sed ĝia fino plezure surprizis min, ĉeestantoj povos kompreni ĝin per la ludarto.

J.-P. Boulet (Francujo)

La Kombilo, de Lina Gabrielli, eld. K. Kleszczynski (International Center of Arts), Romo 1962. 72 p. 21 × 14 cm. broŝ. 4 ilustraĵoj. Prezo 5,60 gld. (22,40 st.).*

Jen estas ĉarma rakonto pri amo kaj amikeco, kies fono estas Universala Kongreso. La libro respektas la atmosferon de niaj kongresoj kaj skizas kelkajn partoprenantojn iliajn.

Tamen, la vera temo de la rakonto estas la rilato inter viro kaj virino: Por provi eniri la hotelan ĉambron de juna virino, vira kongresano proponas al ŝi sian kombilon; sed la junulino ne permesas lian eniron, ĉar permeso impresus kvazaŭ konsento al ama aventuro. Anstataŭe, peto pri la sama kombilo estas preteksto por ŝi riski eniri lian ĉambron kaj tiel konduki la militon al la malamika batalkampoj. Ankaŭ tie la volo de la knabino estas pli forta ol la deziroj de la viro, per vortoj kun li ŝi duelas, per argumentoj ŝi lin senarmigas.

Li kaj ŝi estas prezentataj kiel du diskutantoj, koketaj sed sincere, kiuj volas montri al la alia la justecon de la propra starpunkto. "Ŝia" argumentado estas ĉiel konvinka, sed la recenzanto — eble ĉar li estas viro — ne povas ne demandi sin, ĉu tiel povis okazi la historio. La respondo mi ne scias, sed mi rekomendas la libron, al legantoj por ke ili ekkonu virinan psikon, al legantinoj por ke ili decidu, kiom ili akordas kun la ĉefrolulino.

La rakonto estas verkita en pura kaj simpla Esperanto, kiu plene harmonias kun ĝia dolĉa naiveco. La libron ornamas kovrilo desegnita de la eldonisto kaj kvar tutaĵaj ilustraĵoj artaj de Mary Pietropaolo.

E. Svane (Kopenhago)

**PREMIO
"COMELLA-BASSOLS"
KVINA KONKURSO
VERDIKTO**

Ni havas la honoron komuniki al la esperantistaro, ke post la ĝenerala voĉdonado rezultis premiita la rakonto MALJUNA KORO, originale verkita de sinjoro VAŤA Wladimir, el Ĉeĥoslovakio.

La Juĝantaro gratulas lin kore, kaj multe dankas ĉiujn partoprenintojn pro ilia imitinda kontribuo por la sukceso de la Premio.

*Teo Jung, Emilija Lapenna,
Lluís Mimó, kaj Francesc Vilà-Sekretario.*

Curso de Esperanto, de A. GÓMEZ CRUZ. Eld. Editorial Jus, Guadalajara, Meksiko, 1963. 3-a eldono, 2000 ekz. 116 p. 23 × 17 cm. Prezo: 6,75 gld. (27 st.).*

Fakte tiu ĉi libro ne estas "Curso" (Kurso), sed: Gramatiko en hispana lingvo por la instruado de Esperanto. La tuta verko sekvas la skemon de la antikvaj hispanaj gramatikoj, klarigante la diversajn funkciojn kaj la aplikadon en Esperanto.

Pro tio, ĝi ne plenumas la esencajn kondiĉojn postulatajn de la moderna didaktiko kaj la nuntempaj esperantaj instrumetodoj. Ni devas rimarkigi, ke la libro presigis unuafoje en 1908, tio estas, antaŭ pli ol duonjarcento; pro tio ni trovas ĝin ne aktuala laŭ metodo.

Ekzemple, ĝi ne permesas ke la lernanto uzu la lingvon ek de la komenco, ĉar la lernado gradigita de la gramatikaj funkcioj ne permesas ke li konstruu per si mem esperantajn esprimojn ĝis la fino de la instruado.

Hugo A. Lingua
(Rosario, Argentino)

La kampanjo Kao Lang de Nguyen Huy TUONG. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, 1962. 117 p. 19 × 13 cm., kun unu mapo. Militmemoraĵoj.*

La preparado por la milito inter la francoj kaj la vjetnamoj rezultigis la kampanjon Kao Lang. Ĝi komenciĝis per rekrutigo mobilizanta la loĝantaron. Siaflanke, franca aviado superflugas jam kaj bombardas. Survoje al la batalkampoj estas pendigita banderolo, kies teksto estas jena: "Mi firme decidu gajni la premion de Prezidanto Ho Chi Minh". — Fine, oni atingas la batalkampon. Ankaŭ siavice atakas malsato kaj malmovado, pro manko de necesaj. La situacio pli kaj pli malfaciliĝas, sed tiun penadon rekompencas la venko.

E. Raveloson (Tananarive)

La germanaj orientaj teritorioj — eŭropa problemoj. Eld. Gerhard Rautenberg, Leer, Germanujo, 1963. 47 p. 17 × 24 cm., kun multaj fotoj, ankaŭ koloraj. Prezo: 0,75 gld. (3 st.).*

Per tiu ĉi kolekto da fotoj, citaĵoj, statistikoj, mapoj kaj aliaj dokumentaj materialoj, la eldonintoj argumentas la kulturan kaj historian apartenon al la germana ŝtato de difinitaj teritorioj nuntempe administrataj de Pollando kaj troviĝantaj oriente de la riveroj Odro kaj Niso.

V. Sadler

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

El idioma auxiliar Esperanto, de José CLARAMUNT, Escuelas Pías, Villanueva y Geltrú (Barcelona), Hispanujo. 12 p. 24 × 17 cm. Hispanlingva informo artikolo.

Studoj pri ameloj de legumenoj, de Sin'itirô KAWAMURA. Eld. Fakultato de Agrikulturo, Kagawa Universitato, 1963. 50 p. 26 × 18 cm., kun fotoj kaj grafikaĵoj.

Decidaj argumentoj, de L. MIMÓ, postparolo kaj studo pri la partipoj, komplementaj al la verko "Perfekto de la Esperantaj Verboj". Eld. la aŭtoro, Barcelona, 1963. 18 p. 24 × 17 cm.

Pri la ĝusta traktado de kontraŭdiro interne de la popolo, de MAŬ Zedong. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 61 p. 18 × 13 cm. Prezo bind. 1,00 gld.; broŝ. 0,50 gld.

Internacia Mondregno Kreiĝanta, de MARTINUS. El la dana trad. Peter ZACHO. Eld. Martinus-Instituto, Kopenhago, 1962. 88 p. 19 × 12 cm., bindita. Prezo: 3,90 gld. (15,6 st.)

Rimoj por infanoj, de Nenjo Rimanto. Eld. The Plan Stationers, Anglujo, 1963. 24 p. 20 × 13 cm., kun aŭtorportreto kaj 9 desegnaĵoj de P. Genesis.

La Dia Komedio, de DANTE Alighieri. Traduko de Giovanni PETERLONGO paralele kun la itala teksto. Eld. Edizione SIEI. Milano, 1963. 709 p. 28 × 21 cm., kun antaŭparoloj de Bruno MIGLIORINI, Paolo PETERLONGO, Piero BARGELLINI kaj Gaston WARINGHIEN, kun komentariaj notoj, listo de variantoj, indekso de propraj nomoj kaj 89 tutaĵaj reproduktaĵoj de la originalaj ilustraĵoj de Sandro BOTTICELLI. Prezo tole bindita kun plasta ŝirmilo kaj kartona skatolo: 36,— gld. 144 st.)

Lingvo, Stilo, Formo, studoj de K. KALOCSAY. Eld. Librejo Pirato, Osaka, 1963. Foto-represo. 142 p. 18 × 13 cm. Klasika Esperantologia verko.

La Esperanta Verbosistemo, de T. NAKAMURA. Eld. "Kosmo", Osaka, 1963. 30 p. 21 × 15 cm. En japana lingvo kun resumo en Esperanto.

Cizojazyčná korespondence pro filatelisty (Multelingva korespondado por filatelintoj), de D-ro P. KUCHARSKÝ. Eldonejo de Transporto kaj Komunikiloj, Praha, 1962. 225 p. 16 × 24 cm. Filatela terminaro kaj frazaro en lingvoj Esperanta, ĉeĥa, rusa, germana, franca, angla, itala, hispana, kaj hungara.

Tra la Mondo

Aŭstrujo

● Vintra feriosemajno kun skikonkurso okazos ĉe Edlach apud Payerbach, 26.12 ĝis 1.1.64. Informas A.E.F., Wien 15, Fünfhausgasse 16. Ĝin sekvos turisma aranĝo en Vieno.

Japanujo

● La 50-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj kun 602 ĉeestantoj inkluzivis la unuan oratoran konkurson por la pokalo Yagi (gajnis S-ro Kamiyama) kaj la unuan belartan konkurson (gajnis D-ro Koniŝi). Anoncis sin kongresanoj el Ĉinujo kaj Koreujo, kvankam bedaŭrinde ili ne sukcesis atingi Japanujon.

Nederlando

● Lige kun la nova leĝpropono pri instruado de Esperanto, la instituto "Esperanto en Edukado" komencas novan korespondan kurson speciale por instruistoj, sub gvido de Ak. Faulhaber kaj S-ro Zondervan.

● La instituto "Esperanto en Edukado" eldonis nacilingvan 20-paĝan dokumenton, per kiu ĝi proponas al lernejoj kaj pedagogiaj centroj kunlaboron en esploro pri la signifo de Esperanto por alta kaj mezgrada prepara edukado.



Kostumoj rumana kaj liberia ĉe la usona kongreso.

Nov-Zelando

● Fierante pri la multaj novzelandaj reklamoj en la Jarlibro 1963-a, la ĉefdelegito de UEA S-ro J. T. Allen invitis la ĉefdelegitojn de Usono, Kanado kaj Aŭstralio al amika "duelo" por vendi pli da reklamospaco en la Jarlibro 1964-a. Ni deziras al ĉiuj la venkon!!

Usono

● La 11-an Kongreson de E.L.N.A. ĉeestis eminenta Liberiano (okcidenta Afriko), S-ro E. K. Collins, kiu ĵus eklernis Esperanton kaj intencas porparoli ĝin en sia lando. (foto).

Laŭfaka

Farmacio

● La Asocio de Farmaciistoj (nova adreso: via Lucullo, n. 6, Roma, Italujo) fariĝis "internacia centro" sub protekto de la itala "Sendependa Kultur-Movado".

Filologio

● Fondiĝis filologia sekcio de ISAE. Provizora sekretario: S-ro L. Marikin, ul. Dima H. Dimov 53, Sofia-6, Bulgarujo.

Korespondado

● La organizaĵo "Geonkloj Esperantistaj" jam kunligis per korespondado 119 plenaĝulojn kun 199 infanoj en 26 landoj. Vidu la artikolon sur p. 77 (aprila "Esperanto").

Instruistoj

● Regiona didaktika centro en Sardinio oficiale distribuis nacilingvan raporton pri la rondoj "Graĵnoj en Vento" kaj pri la Internacia Lingvo, inter instruistoj de la teritorio. Alilandaj partoprenantoj de "Graĵnoj en Vento" klopodu atingi la samon!

● Per 76 voĉoj favoraj kaj 20 sindetenoj la Ĝenerala Unuiĝo de Instruistoj en Meza kaj Alta Edukado en Nederlando starigis je 30.8.63 Esperantistan sektion.

Parto de la impona ekspozicio aranĝita de ges-roj Arandjelović okaze de la Beograda Konferenco de Lernejoj.





"Angoroj", la unua dialoga Esperanta filmo pretiĝas! Realigas Jacques Mahé en kunlaboro kun Internacia Arta Teatro. Sur la foto de maldekstre: Jacques Mahé, Jana Ravšelj, Srdjan Flego, Marc Darnault kaj Jean Thierry. Fotis Jacques Mahé.

Juro

● La internacia movado "Amnestio", kiu celas liberigi personojn kiuj estis malliberigitaj kontraŭ art. 18 kaj 19 de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, klopodas uzi Esperanton. Informos S-ro C. van der Vlies, Statenweg 123 c, Rotterdam-4, Nederlando.

Mondcivitanoj

● Internacia Registro de la Mondcivitanoj klopodas starigi "mondanistan reton de Esperanta tradukado". Dezirantoj kunlabori skribu al: I.R.M.C., 55 rue Lacépède, Paris 5, Francujo.

Ornitologio

● Brazila kompanio eldonis longedaŭran diskon "Brazila Birdsimfonio" laŭ registraĵoj de ornitologo Johan Dalgas Frisch. La kovrilo estas presita kaj la komentario registrita en Esperanto, sed tre bedaŭrinde la komentario estas plejparte nekomprenebla pro la forte portugala prononco.


Radio

● Speciala Morsa kodo por Esperanto, preparita de internacia laborgrupo, estas provizore agnoskita de UEA kaj aperos kun detala raporto en la dua parto de la Jarlibro. Ĝis nun ĝin aprobis la usonaj aŭtoritatoj, kaj espereble la ekzemplon sekvos ankaŭ aliaj landoj, sed ĝis tiam ne estos permesite uzi ĝin por radio-komunikado.

Turismo

● Ekde januaro de 1964 aperos el Bulgarujo nova luksa revuo pri turismo kun titolo "Ripozoj" kaj kun internacia temaro. La nova Esperantlingva eldono, kiu estos abonebla ĉe UEA, aldoniĝas al la jam ekzistantaj en angla, franca, germana kaj rusa lingvoj. Ĝi aperos dumonate.

● Ĝemeliĝis la konataj tendegoj de Vallon-Pont d'Arc en Francujo kaj Primošten en Jugoslavio. Ambaŭ estas precipe vizitataj de Esperantistoj, kaj eldonas Esperantlingvajn prospektojn.



49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Den Haag, 1-8 Aŭgusto 1964
Sub la Alta Protektado de Sia Moŝto Juliana, Reĝino de Nederlando.

Konstanta Adreso: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.


OFICIALA KOMUNIKO

No. 2

Rotterdam, la 15-an de oktobro 1963
Infana Kongreseto.

La aliĝo al la 9-a Internacia Infana Kongreseto estas malfermita. En ĝi povas partopreni nur infanoj

(daŭrigo sur p. 197)



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L.J.V." sendu al:
Ivo Osibov, Splitskog odreda 15, SPLIT,
Jugoslavio.

"KONTAKTO" – INTERNACIA JUNULARA REVUO

Ankoraŭ unu programero de la Junulara Jaro komencis efektiviĝi. El plurmonataj klopodoj rezultis provnumero de junulara internacia revuo en Esperanto, kiun jam vidis la partoprenintoj de la kongresoj en Vraca kaj Sofia kaj kiun ĉiu povas havi kontraŭ pago de 1 guldeno ĉe la CO de UEA.

"Kontakto" – ĝi estas la nomo de la nova revuo – en plaĉa, arte desegnita kovrilo donas tre interesan kaj varian enhavon. Inter alie oni povas legi artikolojn: "Junularo – ĉu valida koncepto" de Ken Miner, "Needzinaj patrioj: Usona socia problemoj" de Katherine Chaplin, "Eduka progreso en la nova Nigero" de Anthony Alabe, "Pensoj pri Nigero edukado" de Sam Apeji kaj humorojn "Nestabila elemento" de Jaroslav Dietl. Ĉi tiu provnumero prezentas ankaŭ kelkajn primovadajn artikolojn, sed estonte ili tute forestos el la revuo. Ja pri tio legi ni havas sufiĉajn okazojn en aliaj gazetoj. La nova celas pritrakti internaciajn sociologiajn, kulturajn, junularajn kaj aliajn problemojn, prezenti ĝeneralajn interesojn kaj ĝi nur uzos Esperanton por atingi vere internacian legantaron.

La revuo aperos kvarfoje jare kaj ĝia jarabono kostas 8 guldenojn aŭ egalvaloron, kiun oni povas pagi al "Kontakto", UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando. En t.n. "nepagipovaj" landoj oni povas akcepti nur limigitan nombron da abonoj pere de kontoj speciale starigitaj. Pliajn informojn oni povas ricevi ĉe la jam menciita adreso.

Dank'al favora aranĝo inter UEA kaj TEJO ĉiu juna (sub la aĝo de 21 jaroj) membro-abonanto de UEA kaj ĉiu membro-abonanto ĝis 25-jara senpage ricevos la revuon. Do, gejunuloj ne pli ol 25-jaraj per nura aliĝo al UEA aŭtomate ricevas sen ia ajn aldona pago, krom la ĝisnunaj publikaĵoj, ankaŭ la junularan revuon. Nur tiuj, super la aĝo de 25 jaroj kaj nur la nemembroj de UEA devas aparte aboni la gazeton.

Por certigi interesan legaĵon al la lerneaj kursoj la Komitato de TEJO decidis tre favore prete proponi la revuon al la lernejoj, en kiuj Esperanto estas oficiale instru-

ata kaj kiuj abonos minimume 10 ekzemplerojn de la "Kontakto".

Ĉiu junul(in)o leganto povas siaflanke kontribui al la intereseco de la gazeto. Redaktoro Humphrey Tonkin (7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., USA) bonvenigas artikolojn pri temoj sociologiaj, kulturaj, sportaj kaj vojaĝaj. Li ankaŭ daŭre bezonas fotojn kun aŭ sen artikoloj. La kontribuoj povas esti tradukaĵoj verkitaj de kompetentuloj, nur ili havu iun apartan intereson por la junularo.

JUNULARA KUNVENO DUM LA 15-A IFEF-KONGRESO

En la kadro de la 15-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso la 15-an de majo 1963 oni aranĝis Junularan Kunvenon. Ĉeestis 44 gejunuloj el 11 landoj. La partoprenantoj aŭskultis la raporton de la junulara gvidanto de IFEF D-ro Imre Ferenczy pri la farita laboro post la 14-a Budapeŝta IFEF-Kongreso. En Francujo, Hungarujo, Aŭstrujo kaj en Polujo vigle laboris la IFEF-Sekcioj por organizi la junularan movadon. D-ro Ferenczy laŭdis la junulojn de la urbo Linz (Aŭstrujo) kaj la gvidantaron de la francaj gejunuloj f-ino Arlette Bole, kiuj agadis tre entuziasme en la intereso de la junularo.

La ĝisnuna laboro estis nur eksperimento. Oni devas daŭrigi la agadon junularan de IFEF. La junaj kolegoj el diversaj landoj donis al la gvidanto de IFEF tre interesajn konsilojn kaj praktikajn proponojn.

La partoprenintoj akceptis la jenan rezolucion:

"Ni, la partoprenantoj de la Junulara Kunveno de la 15-a IFEF-Kongreso pridiskutis la raporton de la junulara gvidanto pri la farita laboro. Ni konstatis, ke post la 14-a IFEF-Kongreso okazinta en Budapeŝt kreskis la aktiveco de la junularo. Precipe la Franca, Aŭstra, Pola kaj Hungara IFEF-Sekcioj laboris tre aktive.

Estus dezirinde ankaŭ en aliaj landoj organizi la junularan movadon inter la fervojistoj. Por disvastigi la junularan agadon oni devas kontakti kun la diverslandaj IFEF-Sekcioj pere de vasta korespondado, konkursoj, recipro-

kaj vizitadoj. Ni proponas al la Estraro de IFEF, ke la venontjara Kongreso pritraktu kaj decidu pri la organiza formo de la junularo en la kadro de IFEF, kiam ankaŭ en aliaj landoj oni komencos viglan junularan aktivecon. Ni proponas pli efikan kunlaboron kun la Estraro de TEJO kaj kun aliaj junularaj esperantaj organizaĵoj."

Fine D-ro Imre Ferenczy transdonis donacojn al la reprezentantoj de 11 landoj. F-ino Arlette Bole dankis la laboron kaj ĉeeston de la gejunuloj kaj fermis la Kunvenon.

La 16-an de majo oni aranĝis la distran vesperon por la junularo en la "Harold Clowes Community Hall". Ĉi tie okazis ankaŭ la demonstrado de dancoj. La partoprenantaj gejunuloj bone amuziĝis dum la distra vespero, kie Kavaliro Harold Clowes, unu el la patronoj gastigis la gejunulojn.

Laŭ la propono de la prezidanto de IFEF K. de Jong la Estraro de IFEF denove komisiis D-ron Imre Ferenczy gvidi la junularan laboron de IFEF ĝis la venontjara IFEF-Kongreso. I. F.

SUKCESO EN MADAGASKARO

La prezidanto de la Junulara Esperantista Sekcio de Madagaskaro, S-ro Randrianekena Roger dum la pasinta libertempo okazigis kurson en Tananarivo, la ĉefurbo de Madagaskaro, dum 15 sinsekvaj tagoj, al 15 gejunuloj. Post la kurso sin prezentis al la unua ekzameno de Esperanto 9 kandidatoj; ses el ili sukcesis.

Post tiu kurso, li transiris vagonare la vastajn kamparojn kaj arbarojn kaj atingis Tamatavon, orienta urbo kaj komerca haveno en grava provinco. Tie li faris same kiel en Tananarivo, sed krome starigis grupon. Ni esperu, ke baldaŭ formiĝos ankaŭ junulara grupo tie. Afable pruntedonis al li skribmaŝinon kaj multobligilon, kiuj permesis al li presi anoncilojn, la Komerca Ĉambro de Tamatavo.

De la 1-a de Aŭgusto 90 gestudentoj ĉeestis lian kurson. Post 15 tagoj sin prezentis al la ekzameno 61 personoj el la partoprenintoj; 10 el ili sukcesis akiri la Ateston pri lernado.

La Esperantista Asocio de Madagaskaro helpis efektiviĝi tiun ĉi sukceson pagante la vojaĝon de nia amiko Randrianekena Roger.

Eugène Raveloson

ADRESSANĜO

La redaktoro de ĉi tiu rubriko translokiĝis al alia strato. Tial ĉiuj kunlaborantoj kaj legantoj estonte bonvolu direkti la korespondadojn por "La Juna Vivo" al Ivo Osibov, Splitskog odreda 15, Split, Jugoslavio.

Radio Roma. 1-XI, La 2-a de Novembro; 5-XI, Tra la literaturo; 8-XI, "Memoraĵoj" de Luigi Settembrini; 12-XI, Novaĵoj el Italujo; 15-XI, La preĝo de S-ta Bernardo al la Virgulino Maria en la lasta kanto de la "Dia Komedio"; 19-XI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 22-XI, Vagado tra Sicilio; 26-XI, Leterkesto; 29-XI, Grandaj italaj pentristoj: Beato Angelico. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella.

Pola Radio. El Varsovio la ĉiutaga programo estas nun dissendata per la jenaj ondoj: 200m. (1502 kcs), 50.42m. (5950 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.18m. (7285 kcs), 31.45m. (9540 kcs), 31.01m. (9675 kcs). Tempo kaj daŭro ne ŝanĝitaj.

Pola Radio. El Varsovio la ĉiutaga programo estas nun dissendata per la premioj. La templimo por sendado de respondoj estas la 30-a de novembro. Petu la regularon al la adreso: Pola Radio, Filatela konkurso, Varsovio, Pollando.

Radio Praha. 28-XI, Karavano de Amikeco (Tibor Sekelj); 19-XII, (an-
stataŭ 26-XII), Kion ni atendas de la Novjaro 1964? (Voĉoj de la aŭskul-
tantoj). Dek-kvinminuta parolado dum germanlingva programo por Aŭs-
trujo de 17.15 ĝis 18.00. (G.M.T.)

(daŭrigo de p. 195)

de 6 ĝis 13 jaroj kun bona lingvo-
scio. La kotizo por la tuta kongresa
semajno estas 42,— ned. gld. Du aŭ
pluraj infanoj de la sama familio
pagas po 37,— ned. gld.

Glumarko.

Aperis la Kongresa Glumarko!
Ĝi estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj
de la Landaj Asocioj aŭ rekte ĉe
la Libro-Servo de U.E.A. La prezo
estas 0,40 ned. gld. por ĉiu folio
(10 glumarkoj).

Foto-Konkurso.

Ankaŭ okaze de la 49-a U.K.
okazos konkurso por foto-amatoroj.
Por la gajnintoj de la konkurso
estas antaŭviditaj altaj premioj.
Detaloj aperos en venontaj komu-
nikoj.

Statistiko.

Je la 15-a de oktobro aliĝis en-
tute 563 personoj el 27 landoj
(pasintjare 180 el 25 landoj).

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 362 La 1-an de oktobro 1963

DELEGITOJ

Aŭstralio

Nambour (Queensland). 5300.

D: S-ro N. Collier, farmbienisto,
P.K. 30, Buderim; tel. Buderim
485.

Port Lincoln (S. Australia). 7.000.

D: S-ro S. Grant, fervojisto, 27
Matilda St.

Preston (Vic.) 86.000.

FD (Framasonismo): S-ro H. M.
Cohen, ŝuisto, 83 Youngman St.,
Preston N. 18, Melbourne; tel.
JU. 3572.

Rockhampton (Queensland). 45.000.

D: S-ro H. V. Petley, dominsekt-
forigisto, 81 Quarry St.; tel. 4543.

Sydney (N.S.W.). 2.250.000.

FD (Religio: Ekumenismo): S-ro
K. Smith, eduka oficisto, 72 Sea-
view St., Balgowlah; tel. 94-4996.

Aŭstrujo

Graz. 250.000.

FD (Baha'i-religio): vakas.

Linz a.d. Donau (Oberösterreich).
200.000.

FD (Fajropolico): S-ro O. Hasel-
bauer, ŝtata oficisto, Hatschek-
strasse 32; tel. (laboro) 2-81-17 aŭ
2-22-23.

FD (Turismo): la FD (Fajro-
polico).

Plainfeld (Salzburg). 320.

D: vakas.

Belgujo

Brugge 60.000.

FD (Historio): S-ro F. Roose,
profesoro, St. Klaradreef 59; tel.
(050) 31981.

FD (Sporto: futbalo): la FD
(Historio).

FD (Turismo): la FD (Historio).

Kortrijk 42.000.

FD (Fervojo): vakas.

Brazilo

Antônio Dias (Minas Gerais). 12.000.

D: S-ro F. Letro Silva Castro,
farmaciisto, Rua Faria Castro
S/No.

Niterói 246.000.

VD: S-ro J. do Couto, advokato,
Rua Casimiro de Abreu, no 29;
tel. 2.2121.

FD (Skoltismo): la VD.

Rio de Janeiro. 2.800.000.

FD (Industrio: sukerfabrikado):
S-ro Bianor Collect de Araujo,
industrioficisto, Rua Pedro Alves
319; tel. 43-4728.

Uberaba (Minas Gerais). 88.000.

FD (Religio: spiritismo): S-ro R.
França, bankoficisto, Rua Bela
Vista 21, Vila Maria Helena,
Caixa Postal 150.

Britujo

Ashurst (Hants). 2.000.

FD (Edukado): S-ro W. J. Nesbitt,
instruisto, 60 Woodlands Rd.; tel.
Ashurst 729.

Birstall (Yorks). 6.890.

D: S-ro L. G. Livett, kontisto/
kompania sekretario, "Wood
View", 1045 Bradford Rd.; tel.
Batley 5.

FD (Kontoscienco): la D.

Canterbury 25.000.

D: S-ro A. G. Tucker, lingva eks-
profesoro, 11 Chaucer Close; tel.
53.17.

Chesterfield 67.400.

FD (Edukado): S-ro K. G. Hague,
meti-instruisto, 73 Hawksley Ave.,
Newbold.

Nailsea/Bristol 7000.

D: S-ro J. Catling, ŝtata oficisto,
Dorneck, 54 Sunnymede Rd.

Southend-on-Sea

D: S-ro R. Murray, ŝtatoficisto
emerita, 29 Northumberland
Cresc., Thorpe Bay, Essex; tel.
Southend-on-Sea 67333.

FD (Religio Baptista): la D.

Bulgarujo

Kolarovgrad 50.000.

FD (Metio: tornado de metaloj):
S-ro I. J. Andreev, tornisto, str.
"Sredna-gora" N-ro 31.

Loveč 35.000.

JD: F-ino D. Petkova, oficistino,
V. Kolarov 51.

Sofia 3.700.000.

FD (Maŝinoj metaltranĉaj): S-ro
S. Minkov, emerita teknika in-
struisto, str. Sredna Gora 129;
tel. 3-13-08.

Danlando

Augustenborg (ALS) 2.000.

FD (Muziko): S-ro E. Kirschner,
muzikisto, Parkgade 4; tel. 305.
FD (Sporto: ŝako): la FD (Muziko).

Bajlum (Jylland). 500.
D: S-ino R. Lønblad, instruistino,
Bajlum, Roslev; tel. Roslev 318.

Faaborg (Fyn). 6.000.
D: S-ro E. Knudsen, diplom-
ingeniero, Østergade 21; tel. 283.
FD (Instruado): S-ino E. Nielsen,
instruistino, Svendborgvej 119;
tel. 212.

Glostrup 22.000.
FD (Muziko): vakas.
FD (Sporto: ŝako): vakas.

Finnlando

Jokela (Uudenmaan Lääni). 4.000.
D: S-ro M. Saveljeff, kartsiste-
misto, Ainola.
FD (Religio: Ortodoksa): la D.

Francujo

Châteauroux (Indre). 42.000.
D: S-ro Pierre Soulet, kateĥisto,
20 rue Bernardin.
FD (Religio Katolika): la D.

Lille (Nord). 195.000.
D: S-ro R. Bocquet, sekretario,
269 Rue Chanzy, Hellemmes-lez-
Lille; tel. 57.07.93 (oficejo).

Lyon 4
FD (Medicino): D-ro A. Vedrine,
kuracisto, 8 ave. Cabias; tel.
83 89 60.

Mont-Saint-Aignan
(Seine-Maritime) 6.000
FD (Medicino): D-ro P. Berlot,
kuracisto, Place Colbert, Tour
Centrale; tel. 70 05 99.

Poitiers (Vienne) 52.600
D: S-ro J. P. Guillot, fakultato-
asistanto, 3 Place Duguesclin.

Quillan (Aude)
D: S-ro P. Régnier, horlogisto,
Rue de la Mairie 11; tel. 209.

Germanujo

Essen (43) 640.000
FD (Religio: Katolikismo): vakas.

Frankfurt (6) (Hessen) 685.000.
FD (Bibliotekaj aferoj): F-ino G.
Braun, dipl. bibliotekistino, Stal-
burgstrasse 22, 6 Frankfurt (Main)
1; tel. 59.66.35.

Kastl (8455) 1200
D: vakas.

Lampertheim (684) (Hessen) 25.000
D: D-ro J. Kondor, gimnazia pro-
fesor, 684 Lampertheim/Hessen,
Ernst-Ludwig-Str. 11.

Laupheim (7958) (Württemberg)
10.000
D: S-ro G. Jocham, fervoj-
inspektoro, Gebh. Jocham, 7958
Laupheim, Westbahnhof; tel. 587.

Grekujo

Thessaloniki 650.000
D: S-ro D. Vlahopoulos, aŭtobus-
kondukisto, strato Antheon n-ro
36 T.T. 11.

Hispanujo

Ceuta (Norte de Africa) 75.000
D: S-ro R. M. Antonio, proku-
risto, Barriada General Sanjurjo,
grupo 13, n-ro 3; tel. 1939.

Huete
D: vakas.
FD (Naturismo): vakas.

Italujo

Firenze 485.000
JD: S-ro E. Taddei, maŝina kom-
postisto, Via Giovanni Marradi
17; tel. 60 11 04.

Vicenza (Veneto) 102.000
D: S-ro G. Vangelista, pensiulo
poŝta, Via Burci 7; tel. 2 75 44.

Israelo

Haifa
D: vakas.
FD (Asekuro): vakas.

Japanujo

Matumoto-si (Nagano-ken) 145.000
FD (Medicino) Prof. S. Kato, pro-
fesor de oftalmologio, Nakahara-
ĉo 844; tel. 2-3897.

Jugoslavio

Beograd 700.000
FD (Literaturo): S-ino M. G.
Stoll-Arandjelović, aktorino, 29
Novembra br. 37 zgr. I st. 3.

Dubrovnik
FD (Edukado): vakas.

Vrboska (Dalmatio) 800
D: S-ro D. Matković, instruisto,
Vrboska, otok Hvar.
FD (Edukado: lingvoinstruado):
la D.

Maroko

Marrakech
D: vakas.
FD (Instruado): vakas.

Nederlando

Bussum (Noord-Holland) 40.000
FD (Filatelo): S-ro H. J. Hendrik-
sen, instruisto pri angla lingvo,
Vossiuslaan 3; tel. 02959/14259.

Den Haag
FD (Vegetarismo): S-ro D. M.
Ponti, Laakkade 80; tel. 11 84 00
aŭ 11 84 01.

Nov-Zelando

Auckland 530.000
FD (Dom-konstruado): S-ro P. S.
Stronach, ĉarpentisto, 38 Arthur
St., Ellerslie, S.E. 6; tel. 59 72 66.

Dunedin (Otago) 100.000
D: F-ino M. D. Wildey, licea in-
struistino, 6 Picardy St., Dunedin
W. 1; tel. 3 62 42.
FD (Lingvoj): la D.

Eastbourne (Wellington) 2700
D: S-ro V. M. Turner, presisto,
8 Huia Rd., Days Bay; tel. 8968
Eastbourne; 60-867 Wellington.
FD (Presado): la D.

Lower Hutt (Wellington) 53.000
FD (Geologio): D-ro W. F. Har-
ris, paleobotanikisto, D.S.I.R., Box
368; tel. 7 82 78.
FD (Religio: Katolikismo): la FD
(Geologio).

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1963

Stato je la 30-a de Septembro

Konkurso I

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Finnlando	2570	2900	112,84
2. Japanujo	3240	3630	112,04
3. Francujo	7225	7599	105,18
4. Usono	4110	4235	103,04
5. Jugoslavio	5180	5270	101,74
6. Danlando	2936	2969	101,12
7. Svislando	2141	2165	101,12
8. Nederlando	5068	5050	99,64
9. Britujo	6368	6296	98,87
10. Italujo	4220	4125	97,75
11. Brazilo	3856	3632	94,19
12. Hispanujo	2696	2470	91,62
13. Belgujo	1695	1545	91,15
14. Norvegujo	1755	1565	89,74

15. Svedujo	6640	5480	82,53
16. Germanujo	7221	5175	71,67

Konkurso II

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Nov-Zelando	1167	1321	113,20
2. Aŭstralio	1233	1395	113,14
3. Kanado	769	737	95,84
4. Madagaskaro	250	236	94,40
5. Portugalujo	515	485	94,17
6. Israelo	300	280	93,33
7. Argentino	905	810	89,50
8. Islando	250	215	86,—
9. Aŭstrujo	1475	970	65,76
10. Urugvajo	250	135	54,—
11. Sudafriko	250	90	36,—

Vidu la regulojn sur paĝo 26 (Febr. 1963)

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Beguín, F-ino D., Gstaad, Svisujo.
Bou Vila, S-ro F., Sabadell, Hispanujo.
Bracquemond, S-ro G., Clermont-Ferrand, Francujo.
Gonzalez Cantero, S-ro P., Madrid, Hispanujo.
Sadler, D-ro V., Rotterdam, Nederlando.
Woessink, S-ro E. J., Arnhem, Nederlando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1963

470. Freitas, S-ro A. Wantuil de, Rio de Janeiro, Brazilo; 471. Gaio, S-ro J. M., Rio de Janeiro, Brazilo; 472. Wekker, F-ino E., Amsterdam, Nederlando; 473. Donovan, S-ro W. J., Wellington, Nov-Zelando.

FONDAJO DOMO

F-ino J. Terriijn, Belgujo, 50,— gld.

FONDAJO JUNULARA GAZETO

S-ro G. C. Fighiera, Belgujo, 22,75 gld; S-ro P. Bonomi, Italujo, 1,20 gld; F-ino W. E. Walter, Usono, 17,50 gld; C. A. Becquet, Usono, 35,— gld; S-ino W. McGrogan, Usono, 7,— gld; S-ino W. F. Moore, Usono, 8,75 gld; S-ro C. Minnaja, Italujo, 15,50 gld; S-ro I. Osibov, Jugoslavio, 19,— gld; F-ino C. Sfarini, Italujo, 46,15 gld; Entute: 573,22 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino Ĉ.O.

EN LA CENTRA OFICEJO DE U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam Nederlando

estas loko por

**Lerta oficisto
por la libroservo**

kun bonaj scioj pri
librokomerco

**Akurata kaj sperta
Sekretari(in)o/Korespondant(in)o**

kun perfekta lingvoscio kaj
kapablo memstare labori

Proponu sin nur tiuj, kiuj jam pli frue laboris en la samaj fakoj. Bonaj referencoj bezonataj. Salajroj laŭ kapabloj. Leteroj kun detalaj informoj al la Direktorino de la Ĉ.O., F-ino M. H. Vermaas, je la supra adreso.

BELEGAJ BONDEZIRAJ KARTOJ POR LA JARFINA SEZONO

kun teksto en Esperanto

laŭ la plej konataj verkaĵoj de la mondfamaj pentristoj kaj kreintoj de monda kulturo BREUGHEL, CEZANNE, DEGAS, MONET, RENOIR, TOULOUSE-LAUTREC, VAN GOGH, UTRILLO.

Duoblaj kartoj kun kovertoj

Serio de 6 diversaj: 3,75 gld, 15 steloj

Serio de 12 diversaj: 7,— gld, 28 steloj

Eldonis U.E.A.

Mendu tuj ĉe la Centra Oficejo aŭ ĉe via Libroservo.

ANONCETOJ

AVERTO - Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmark-kolektantojn.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA (adreso: K.S.M. 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo) kiu peras adresojn laŭ la regularo aperinta en Jarlibro 1962-a.

Kio estas la vero. Kun tiu fama demando kiel elirpunkto la libro montras, ke kapablo kompreni la veron de la vivo kaj akiri realan scion pri ĝi, estas demando pri evoluo. (90 paĝoj. Formato 13 × 19 cm. Fortika verda tolkovrilo kun ora surpriso. Prezo 6,50 d.kr.). Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando. movado, petu detalojn de admini-

Falsan Paradizon forlasas ĉiam pli eminentuloj kiaj Wensing kaj Malmgren. Realisma kaj pozitiva alternativo estas ellaborado de propra "promesita lando". D. Soleo, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.

La Bradforda Esperanto-Societo okazigos letervesperon 16.1.64. Aŭfale skribu amase. Ni respondos! George E. Money, 4 Carrholm Green, Woodside, Bradford 6, Yorkshire, Anglujo.

Por mia grava laboro mi bezonas fotografaĵojn de titolpaĝoj de unuaj Esperanto-lernolibroj: 1) angla de R. Geoghegan, 1889, 40 p., 2) hebrea-germana de Hanez 1889, 66 p., 3) litova de A. Dombrovski, 1890, 62 p., 4) hebrea de D. Gureviĉ, 1890, 38 p., 5) hispana de Huertas J. Rodriguez, 1890, 51 p. Posedantoj de tiuj ĉi Esperanto-lernolibroj estas petataj skribi al A. Holzhaus, 2748 Orchard Lane, Columbus, Indiana, U.S.A.

Geonkloj Esperantistaj. Se vi estas preta servi la infanojn de nia

stranto: 3, Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Anglujo.

S-ro Celestino Ferrer - Belchite, 193-Tarrasa (Barcelona), Hispanujo, interŝanĝas poŝtmarkojn.

Ĝardenistoj! Deziras korespondadon kun fakuloj pri fakaj temoj S-ro Klemeš Horymir, Kopřivnice 201, Okres Nový Jicín (ĈSSR).

Libertempi la tutan jaron je LAZURA MARBORDO, luante hejme-cajn ĉambrojn en vilao de CASSIS. Skribu al samideano Robert Stoffers (Germano) Villa "Tabou", Super Cassis, CASSIS, Bouches-du-Rhône, Francujo.

Deziras korespondi pri religio. Nova Revelacio per Jakob Lorber — Imm. Svedenborg. Josef Eder, fruktkulturisto, Stattegg-Eichberg 13, P. Graz-St. Veit, Aŭstrio.

Ekspozicion ni organizos dum la 29-a Nov-Zelanda Kongreso de Esperanto dum Decembro. Sendu amase Bildkartojn. Nepre respondas: S-ino Betsy Harvey, 21 Stoke Street, Wellington S. 1, Nov-Zelando.

Abonu ĉinan Esperantan periodaĵon:

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata, en 40-paĝa kajero, 19 × 26 cm.

- Premioj:* ☆ Abonanto de 1964, paginta sian abonkotizon antaŭ la 1-a de feb. 1964, povos senpage ricevi belan Esperantan 1964-Kalendaron (17 × 24,5 cm., 24 p., kun 24 famaj ĉinstilaj pentraĵoj);
- ☆ Tiu, kiu varbis du novajn abonantojn por EPĈ, povos senpage ricevi pecon da multkolora silka bildo "Ĉielpaca Pordego de Pekino" (26.5 × 17.5 cm).

*Abonu ĉe Universala Esperanto-Asocio,
aŭ ĉe ĝiaj diverslandaj perantoj, aŭ rekte ĉe la Libroservo de ĈEL.*

☆

ABONTARIFO

<i>Landoj</i>	<i>Monoj</i>	<i>Por 1-jaro</i>	<i>Por 2-jaroj</i>	<i>Por 3-jaroj</i>
Eŭropaj, Nord-				
Amerikaj kaj	gld.	2.50	3.80	5.00
Aŭstraliaj	US \$	1.00	1.50	2.00
landoj	£	0-5-0	0-7-6	0-10-0
Aziaj kaj				
Afrikaj landoj	£	0-2-6	0-3-9	0- 5-0
Latin-Amerikaj				
landoj	US \$	0.50	0.75	1.00

☆

LIBROSERVO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

(Pagita reklamo)

ŜIPESTRO RAKONTAS

originala verko de kapitano
F. T. Lundquist

Streĉaj rakontoj pri vivo kiel junmaristo sur grandaj velŝipoj, kiuj veturas sur malproksimaj marvojoj ĉirkaŭ fremdaj kontinentoj kaj pri travivaĵoj kiel kapitano sur vaporŝipo dum la mondmilitoj.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

72 paĝoj. Prezo: broŝ. gld. 3.75, bind. gld. 6.—.

Mendu ĉe U.E.A. aŭ via kutima libro-servo.

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

La junulara revuo KONTAKTO aperas kvarfoje jare kaj jarabono kostas
la egalvaloron de 8.00 nederlandaj guldenoj

Juna Membro-Abonanto de UEA devas esti malpli ol 22-jara. Lia jarkotizo estas 15.00 ned. guld.

Membro-Abonanto kun "Kontakto" devas esti 21- ĝis 25-jara. Lia jarkotizo estas 20.00 ned. guld.

JMA kaj MA-K de UEA ricevas:

- la du partojn de la Jarlibro de UEA
- la revuon ESPERANTO
- la revuon KONTAKTO

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 20 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio : 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

jarabono : 4 \$ (53,3 steloj)

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska



LA BATOJN
DE LA KORO
ONI PLEJ
BONE
EKZAMENAS
HELPE DE LA
KARDIOLOGIA
APARATARO
DE PHILIPS

Homa koro batanta en kateteriza ĉambro povas esti observata klare kaj precize sur X-radia ekrano aŭ televida monitoro. Kia giganta paŝo antaŭen kompare al la unuaj timemaj X-radiaj ombroj de antaŭ pli ol duonjarcento! Philips fieras ke tra tiom da jaroj ĝi daŭre iniciatis multajn teknikajn progresojn, tiel ebligante la radiologiajn rezultojn de hodiaŭ kaj jam nun antaŭvidigante la realigojn de morgaŭ. Pluraj tre gravaj plibonigoj estiĝis dank' al la fakto ke en la kadro de la Philips-organizaĵo laboras aroj da sciencistoj sur plej diversaj terenoj, ĉiuj kontribuantaj al la progresigo de la radiologio. Kaj tio daŭros. Ĉar Philips ne ĉesos dediĉi sin al la medicino.



PHILIPS

en la servo de la medicina mondo

